

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

3 1984






Laboristinoj de la Pekina Televidila Fabriko ekzamenas kolorajn televidilojn.

Ĉinaj Virinoj

Teksto kaj fotoj de SHI YINGJIE



Ŝpinistino



20% de la laboristoj de la Ŝtala Fabriko de Jiuquan estas virinoj.




En Ĉinio la virinoj estas honoritaj per nomo de “subtenanto de duono de la ĉielo”. Sur siaj postenoj, ili, same kiel la viroj, kontribuas sian talenton al la socialisma konstruado de la patrujo.

Nun en Ĉinio virinoj konsistigas 40% de la totala nombro de laboristaro kaj oficistaro, kaj plie, 80% de la laborantoj de tekstilado kaj komerco estas virinoj.

Post kiam la respondeca sistemo estis efektivigita en la agrikultura produktado, la virinoj en la kamparo povas partopreni en pli multaj laboroj. Per sia diligenta laborado, ili kreis por la ŝtato, la kolektivo kaj propra familio riĉaĵojn pli multajn ol en iu ajn pasinta periodo.


Multaj virinaj sciencistoj, inĝenieroj, agromoj, edukistoj, verkistoj kaj artistoj diligente laboras, kaj senĉese akiris novajn sukcesojn.



Dekstre: Virina labor-grupo de la Ilmaŝina Fabriko de Nantong en Jiangsu



Zhang Shuzhen (la unua de maldekstre), vicprofesorino de la Pekina Agronomia Instituto kaj fakulo de bon-specia kulturado, ekzamenas kune kun studentoj en kampo.



Sperta kuiristino de Jiamusi





Li-nacieca danco



Flegistinoj de la Pekina Infana Hospitalo zorgeme flegas malsanan infanon.



Shen Qiuping (la meza). vicurbestrino de Zhengzhou (ĉefurbo de Henan-provinco), antaŭe estis inĝenierino de la trikotejo de la urbo.



Dai Lili (la maldekstra) kaj Shen Jianping, ĉampionoj de la virina duopa tablotenisa konkurso en la Kvina Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio

Pentristino Li Qiqiong pasigis 30 jarojn en la kaverno de Dunhuang en dezerto por kopii la antikvajn freskojn en la kaverno. Siaj multaj kopiaĵoj estis eksponataj en kaj ekster la lando.



Lernantinoj de la Naciminoritata Mezlernejo en suda Gansu-provinco.



Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto:
Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Trapezado (premiita per ora medalo en la Dua Internacia Fotografia Ekspozicio)

de PENG ZHANGQING

Trapezado estas unu el la sportoj ŝatataj de kore-naciecaj virinoj de Ĉinio.

SUR LA DORSKOVRILO:

Aglo kaj leopardo (bambuaj plektaĵoj de Shengxian-gubernio en Zhejiang-provinco)

KOLORAJ SERIOJ:

Ĉinaj virinoj

Wudalian-lago (Kvin Interligitaj Lagoj)

Fotoj faritaj de esp-istoj

Badaling

Vestoj kaj ornamaĵoj de Mjaŭ-aj virinoj

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Ŝanhaja Postlabora Politekniko
Skulptisto Liu Huanzhang kaj liaj verkoj

Memorigo pri la 90-a datreveno de la naskiĝo de Maŭ Zedong	2
Por kulturi pli da talentuloj	3
Ili ne estas librovermoj	6
Ili rolas kiel viroj	9
Sude kaj Norde de la Granda Muro (3): Proksime de Pekino	50
Esperanto kaj reformado de la ĉina skriba lingvo	13
Amiko de Esperanto — Ĉina elstara muzikisto He Luting	14
POR KOMENCANTOJ: Honesteco	23
SUR NIA LIBROBRETO: Verko malnova kun signifo aktuala	19
ESP-NOVAĴOJ	20
Por pli bone servi al la urbanoj	16
Bambua aglo mirigis usonanojn	27
Sciencistoj en sovaĝejo	29
Poŝto — ponto inter ĉiuj landoj	31
Vivo ligita kun ŝtonoj	35
Postleciona sporta lernejo de Jiangmen	32
Kolorriĉaj kostumoj kaj ornamaĵoj de mjaŭ-aj virinoj	37
VIDINDAJ LOKOJ: Muzeo de vulkanoj	25
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Nacia emblemo de Ĉinio	39
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Kvin Dinastioj, Dek Regnoj kaj Regnoj Liao, Okcidenta Xia kaj Jin	41
POR VIA SANO: Fizioterapio por kolspina malsano	44
NIAJ PERANTOJ:	
Mi kaj mia peranta laboro	24
Pri mia laboro por EPĈ	24
KURANTAĴ AFEROJ	45
ĈINLINGVA KURSO: Tria leciono	48
KORESPONDI DEZIRAS	26, 34

JARABONTARIFO		FR Germanio	DM	14.00	Italio	Lit	6000.00	Portugalia	Esc.	500.00	
Aŭstralio	\$A	7.00	Britio	£	4.00	Japanio	Yen	1400.00	Svisio	SF	12.00
Aŭstrio	Sch	100.00	Finnlando	FMK	30.00	Jugoslavio	Din.	200.00	Usono	US\$	6.00
Belgio	BF	230.00	Francio	FF	40.00	Nederlando	Gld.	16.00	Kanado	Can\$	7.50
			Hispanio	Pts	700.00	Nov-Zelando	NZ\$	8.00			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	4.00	US\$	6.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	2.80	US\$	4.00

Memorigo pri la 90-a Datreveno de la Naskiĝo de Maŭ Zedong


LA 26-a de decembro de la pasinta jaro estis la 90-a datreveno de la naskiĝo de Maŭ Zedong. En diversaj lokoj de Ĉinio oni okazigis diversajn aktivadojn por memorigi pri tiu forpasinta gvidanto de la ĉina popolo, granda marksisto, proleta revoluciisto, strategiisto kaj teoriisto.

Tiutage partiaj kaj ŝtataj gvidantoj kaj pli ol trimil homoj de diversaj rondoj de la ĉefurbo Pekino venis al la Memorhalo de Prezidanto Maŭ sur Tian'anmen-placo, respektive rigardis liajn restaĵojn kaj vizitis lian memor-salonon kaj tiujn de Ĝoŭ Enlaj, Liu Ŝaŭki kaj Ĝu De aranĝitajn en la halo. Granda nombro de koncernaj objektoj, dokumentoj, bildoj kaj leteroj eksponataj en la memor-salonoj montris la revoluciajn meritojn de la kvar grandaj personoj.

Okaze de la 90-a datreveno de la naskiĝo de Maŭ Zedong, oni eldonis "Elektitaj Leteroj de Maŭ Zedong", "Elektitaj Aŭtografoj de Leteroj de Maŭ Zedong", "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong pri Ĵurnalisma Laboro", "Elektitaj Faksimiloj de Skriboj de Maŭ Zedong" kaj "Elektitaj Antikvaj Poemoj Kaligrafie Transskribitaj de Maŭ Zedong". Multa valora enhavo de tiuj eldonaĵoj estas unufoje publikigita. Krome, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio emisiis memorigajn

poŝtmarkojn pri Maŭ Zedong. En diversaj lokoj de la lando oni projekciis la dokumentan filmon "Maŭ Zedong", kaj la rakontan filmon "Kvarfoje Transpasi Chishui-riveron", kiu reaperigas la brilajn figurojn de Maŭ Zedong kaj aliaj revoluciaj gvidantoj.

En tiuj tagoj, ĵurnaloj kaj gazetoj de diversaj lokoj publikigis multajn memorigajn artikolojn. Hu Yaobang, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, publikigis artikolon "La Plej Bona Memorigo". Li diris en la artikolo, ke kamarado Maŭ Zedong estis unu el la fondintoj de nia partio kaj la ĉefa fondinto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. En la plej malfacilaj jaroj de la ĉina revolucio, li plej frue trovis la ĝustan vojon de la revolucio. Li estis la plej granda kaj eminenta persono de nia lando en la pasintaj pli ol cent jaroj. Liaj pozicio kaj rolo en la Komunista Partio de Ĉinio kaj en la ĉina revolucio estas nekompareblaj. Hu diris ankaŭ, ke same kiel multaj aliaj grandaj historiaj personoj, ankaŭ Maŭ Zedong havis siajn erarojn. La partio faris al li ĉiuf flankan takson kaj profunde analizis la kialojn de liaj sukcesoj kaj malsukcesoj por akiri lecionojn. Nun oni vidas, ke nia ŝtato povas elteni ĉian provon kaj nia partio estas plena de viv-energio.



"Elektitaj Leteroj de Maŭ Zedong" kaj "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong pri Ĵurnalisma Laboro" eldonitaj lastatempe

Por kulturi pli da talentuloj

— Pri la laborista-oficista edukado de Ĉinio

MI neniam forgesos la kortuŝan scenon en la Tutlanda Konferenco pri Laborista-oficista Edukado de Ĉinio okazinta en la lasta somero en Pekino. Tiam partoprenantoj pretervole svarmis al la estrado kaj ĉirkaŭis senbrakan mezaĝulon. Li, buŝe tenante penikon, skribis sur blanka papero: “Neniam forgesu unuigon en la batalo kaj vin dediĉu al la prosperigo de Ĉinio!” Kiam li finis sian skribadon, eksonis tondra aplaŭdo tra la halo kaj ĉiuj ĉeestantoj direktis al li respektan rigardon.

La skribinto estas Yu Kedong, heroo sen brakoj, estro de la Laborista-oficista Lernejo de Huainan-karbonejo, orienta Ĉinio. Li estis ministro. Antaŭ 30 jaroj li perdis la brakojn en laborakcidento. Fervora al laborista-oficista edukado, li venkis malfacilojn kaŭzitajn de la kripleco kaj ellernis skribi per peniko tenata de la buŝo kaj skribi sur nigra tabulo per braka protezo. Li ofte iras al la ŝaktoj kun librokesto kaj tie donas lecionojn al ministroj. En la minejo li okupiĝis pri tiu laboro jam 25 jarojn. En la vasta mineja regiono ĉie troviĝas liaj spuroj.

En Ĉinio 130 mil homoj profesie laboras en la laborista-oficistaj lernejoj kaj 350 mil kumule instruas. Krome tie laboras

80 mil aliaj oficistoj. Ankaŭ ili pene laboras, venkante malfacilojn en instruado kaj eksperimentado, per kio ili faras siajn kontribuojn al la aferoj de la laborista-oficista edukado en nia lando.

La laborista-oficista edukado celas kulturi pli da administraj laborantoj kaj teknikistoj el la 110 milionoj da laborantoj en Ĉinio. Nun en nia lando estas pli ol 20 milionoj da lernantoj de tiaj lernejoj, t. e. 20% de la totala nombro de la tutlandaj laboristoj kaj oficistoj. Inter ili la superaj laborista-oficistaj lernejoj havas 1 170 mil lernantojn, la mezlernejoj — 6 880 mil kaj la elementaj lernejoj — 5 milionojn, krome 7 milionoj da personoj studas en mallong-tempaj fakaj kursoj. Depost la naskiĝo de la nova Ĉinio 1 100 mil lernantoj finis sian studon en la superaj laborista-oficistaj lernejoj kaj 4 890 mil atingis la klercon de diplomito el mezgrada faka lernejo post sia studo en tiaj lernejoj. En la lastaj jaroj Ĉinio dediĉis grandan atenton al la oficista trejnado kaj kultura kaj scienca reedukado al la junaj laboristoj. Nun 4 milionoj da oficistoj jam finis sian trejnadon kaj 10 milionoj da laboristoj trapasis la ekzamenon post la reedukado.

La laborista-oficista edukado

de Ĉinio trairis zigzagan vojon. De la naskiĝo de la nova Ĉinio ĝis la mezo de la 60-aj jaroj tia edukado prosperis, tiam oni klerigis 8 700 mil analfabetojn. Surbaze de tio aperis elementaj, mezaj kaj superaj laborista-oficistaj lernejoj. De la lasta periodo de la 60-aj jaroj ĝis la komenca periodo de la 70-aj jaroj preskaŭ komplete stagnis la edukado pro la kaoso kaŭzita de la “kultura revolucio”. Tio damaĝe prokrastis la klerigadon al la juna generacio. En la lasta periodo de la 70-aj jaroj la edukado revigliĝis kaj eniris en novan etapon de disvolviĝo. Nun la ŝtato dediĉas grandan atenton al tia edukado. La nove starigita Tutlanda Administrativa Komisiono pri la Laborista-oficista Edukado gvidas la edukan laboron, dum la Eduka Ministerio de la ŝtato kunlaboras kun la komisiono, la Ĝenerala Laborist-sindikato faras sian regadon super ili, defendas kaj garantias la lernorajton de la laboristoj kaj oficistoj.

Kiu do zorgas pri la edukado en nia lando? Unue, la entreprenoj. Nun 70% de la grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj jam havas siajn proprajn lernejojn. Due, la superaj lernejoj ekspluatas sian latentan forton kaj funkciigas korespond-lernejojn. Trie, diversnivela laborist-sindikatoj starigis 18 mil lernejojn kun 5 290 mil lernantoj. Kvare, la



90 laboristoj kaj senlaboraj gejunuloj de Qingdao organizis "Kolegion de la 7-a Martene". Jen ĝiaj membroj kolektiĝas ĉe la marbordo por kune studi fremdan lingvon.

scienca-teknikaj asocioj de la provincoj kaj municipoj aktive trejnas la sciencistojn kaj teknikistojn kaj anstataŭigas iliajn malnovajn sciojn per novaj. Kvine, ankaŭ aliaj sociaj fortoj funkciigas 612 lernejojn, kie lernas 100 mil personoj.

En Ĉinio estas diversspecaj laborista-oficistaj lernejoj. Sube ni prezentu kelkajn el ili. (La sube menciitaj lernejoj ĉiuj estas laborista-oficistaj lernejoj. Ili diferencas de la ordinaraj regulaj lernejoj. — La trad.)

Televida universitato, entreprenata de la ŝtato, kun 500 mil kursanoj. La Centra Tele-universitato prizorgas la instruadon kaj la 29 lokaj tele-universitatoj kun pluraj konsultejoj aranĝas

la konkretan lernadon. La kursanoj, kiuj studas ĉiujn studobjektojn en la universitato, rajtas sin liberigi de la laboro tri jarojn kaj la sukcesintoj en la ekzameno ricevas kolegian diplomon. La kursanoj, kiuj studas nur unu studobjekton, ne liberigas sin de la laboro kaj, sukcesinte en la ekzameno, ricevas fakan diplomon.

Nun en nia lando funkcias 820 laborista-oficistaj universitatoj kun 140 mil lernantoj. La universitatoj akceptas malpli-ol-30-jarajn laborantojn kun supermezlerneja klereco kaj du servo-jaroj. La universitato celas kulturi fakulojn kun klereco de kolegia diplomo. Por tiuj, kiuj studas tute liberaj de la laboro,

la lernado daŭras 3 jarojn, se oni studas en la laboro, do la lernado daŭras 4-5 jarojn. La universitato donas grandan atenton al la praktika instruado por levi la memstaran laborkapablon de la lernantoj, dank' al kio la diplomitoj povas pli rapide ludi rimarkindan rolon en la laboro.

Nun la korespondaj universitatoj kaj vesperaj kursoj en la tuta lando estas 300 kun 200 mil kursanoj. Ili akceptas lernantojn laŭ la samaj kondiĉoj de la laborista-oficistaj universitatoj, sen limigo de la aĝo. La lernotempo daŭras 3-5 jarojn. Post la diplomitiĝo oni atingas kolegian klerecon.

La postlabora mezgrada lernejo akceptas malpli-ol-30-jarajn

laborantojn kun element-mezlerneja klereco kaj du servojaroj. Tie oni studas 3 jarojn. La lernejo celas kulturi elementajn teknikistojn kaj ordinarajn administrantojn. La tuta lando havas 10 mil tiajn lernejojn kun 1 140 mil lernantoj.

Postlabora lernejo estas ĉefa formo de edukado funkciigata de entrepreno. Laŭ sia bezono la entrepreno donas malsamajn lecionojn por ke la laboristoj kaj oficistoj akiru bezonatajn sciojn kulturajn kaj teknikajn. La lernejo ne limigas siajn lernantojn je la aĝo.

Koncerne la diversajn kursojn trejnantajn fakulojn, ilia tasko estas ellernigi la kursanojn uzi novajn ekipaĵojn kaj materialojn, posedi novan teknologion, fabriki novajn produktaĵojn kaj uzi novajn labormetodojn.

Krome, en nia lando estas starigita la Komisiono pri Ekza-

meno al Memlernantoj, kies branĉoj troviĝas ĉie en la provincoj kaj municipoj de la lando. La komisiono regule ekzamenas la memlernantojn. La memlernanto, kiu sukcesas en ekzameno de unu lernoobjekto, ricevas atestilon. La memlernanto, kiu sukcesas en ekzameno de 11 lernoobjektoj, ricevas kolegian diplomon kaj tiu, kiu sukcesas en la ekzameno de 17 lernoobjektoj, ricevas universitatan diplomon.

Por instigi la laboristojn kaj oficistojn al lernado la ŝtato salajras la lernantojn plene libere de la laboro. La lernejoj estas kalkulataj kiel servodaŭro kaj dum la studado la lernantoj rajtas ĝui ĉiujn bonstatojn kiel nelernantaj laborantoj. La lernado ne malbone efikas al ilia promocio kaj salajroleviĝo. La ŝtato premias la eminentajn lernantojn. La diplomitoj ĝuas ĉiujn rajtojn kiel tiuj de la ordinaraj lernejoj.

En la laborista-oficista edukado troviĝas mankoj kaj la edukado alfrontas kelkajn malfacilojn. Ekz. la mezgrada edukado okupas nur malgrandan proporcion en la tuta afero, kio devas esti ŝanĝita en la struktura reformado, t. e. ĉefe reguligi la proporcion inter la alta kaj meza edukadoj. Kvankam la memstara instruista vicaro stariĝis, al ĝi tamen mankas 30 mil homoj, kaj krome la nivelo de parto de la instruistoj estas relative malalta. Pro manko de monrimedoj, portempe la edukado ne povas multe pliboniĝi.

Estonte, konforme al la bezono de la nacia ekonomio kaj la tiamaj kondiĉoj, ni strebos elkulturi pli da fakuloj en la komenca tempo de la 90-aj jaroj kaj stariĝi oficistan taĉmenton kun modernaj sciencoj kaj teknikoj kaj administraj scioj de la entreprenoj, kaj laboristan taĉmenton kun pli alta kultura nivelo.

Fu Guohui (maldekstre), oficistino de la prilaborejo de la Proviza Stacio de Jangzrivera Navigacio, havis nur klerecon de malsupera mezlernejo. Dank' al sia memlernado ŝi antaŭ nelonge trapasis la ekzamenon por studi en la ekonomika kaj administra fakultato de televida universitato.



Ili ne estas librovermoj

AŬDIĜIS paŝbruo ekster la pordo. Ĉu estas li? Li estas Shi Guozhong, diplomito de la Tianjin-a Xinhua-universitato de Laboristoj kaj Oficistoj. Kiam mi vizitis tiun universitaton, mi informiĝis pri teknika renovigisto Shi Guozhong, kaj volis intervjui lin kaj liajn kunlernantojn. Min akceptis rektoro Liu, kaj li aranĝis nian intervidon.

Malfermiĝis la pordo, kaj eniris mezaĝulo kun nigrakadraj okulvitroj kaj en blua kitelo jam nenova. Mi ne povis tuj distingi, ĉu li estas laboristo aŭ intelektulo.

“Jen Shi Guozhong!” diris rektoro Liu.

Mi ĝoje manpremis kun kamarado Shi kaj sidiĝis kontraŭ li. Li tuj rakontis al mi pri sia travivaĵo.

Shi Guozhong estis tornisto de la Fabriko de Marnavigaj Instrumentoj. Li havis nur mezgrandan klarecon kaj multfoje provis renovigi produktajn instrumentojn, sed ne sukcesis pro manko de necesaj scioj. Poste li sukcese trapasis la eniran ekzamenon de la universitato kaj studis en la meĥanika fakultato. La lernitaj scioj helpis lin en renovigo de pli ol cent specoj de tranĉaj instrumentoj kaj sukcesa faro

de plurborila ilmaŝino. Antaŭ du jaroj la fabriko produktis de li projektitajn lavmaŝinojn “Haihua”. La maŝinoj estas bonkvalitaj, altefikaj kaj malrapide difektiĝas pro frotado kaj gajnis la unuan lokon inter la samspecaj maŝinoj de la lando. Nelonge post sia diplomitiĝo li jam inĝeneriĝis. Post kiam li estis transpostenigita de la Fabriko de Marnavigaj Instrumentoj al la Fabriko de Filmaparatoj, li rapide ricevis konfidon de laboristoj kaj estis elektita kiel vicestro de tiu fabriko. Sub lia zorgo altiĝis la kvalito de la ĉefaj produktaĵoj de la fabriko, kaj ili havis grandan debiton eksterlande.

“Ĉu vi nun ankoraŭ faras teknikan renovigon?” mi demandis Shi Guozhong.

“Nun mi zorgas ĉefe pri organizado de teknikistoj kaj laboristoj por fari renovigojn,” li respondis. “Por mi la urĝa tasko estas lerni sciojn pri administrado. Tio estas deviga lernobjekto por mi, la vicestro de la fabriko.”

Antaŭ ol finiĝis nia interparolo, eniris virino. Ŝi estas nomata Yuan Damin malpli-ol-30-jara, diplomita el la universitato en la pasinta jaro, kaj nun ŝi laboras kiel instruistino en alia

universitato de la laboristoj kaj oficistoj.

Kamaradino Yuan alportis rulon da plano kaj ĝin disvolvis antaŭ mi, por ke mi kontrolu la planon verkitan de ŝi ĉe la diplomitiĝo. Mi ne estas fakulo, kompreneble mi ne konis ĝiajn detalojn. Mi sciis nur ĝian ĝeneralan enhavon, ke ŝi kaj ŝia kunlernantino kune projektis malgrandan vento-generatoron kun kapacito de du kilovattoj.

Kiel produkti elektron per vento? Tio estas unu el la esploraĵoj de la ĉinaj sciencistoj. La du studentinoj faris kuraĝan provon en tiu flanko. En la pasinteco sin trovis ventoenergia generatoro sed ne ideala, ĉar tiu ventumilforma generatoro estis granda kaj bezonis sufiĉe grandan ventoforton. Ĝi povis labori nur ĉe ventoriĉa loko aŭ buŝo de valo. Se la ventorapideco ne superas 9 metrojn ĉiusekunde, la ventumilo ĉesas labori. La projekto de Yuan riparitis tiun mankon per aldono de novaj ventokestoj, kiuj altigas la ventorapidecon de 3 metroj al 17 metroj en ĉiu sekundo kaj havigas al la blovo difinitan ventodirekton, tiel ke vento duguĝa jam povas produkti elektron. En senventa tago oni povas liveri elektron per akumulatoroj. Por fari bonan projekton ŝi legis

grandan kvanton da materialoj, studis meteologion kaj aeromeĥanikon kaj vojaĝis mil kilometrojn por fari esploradojn kaj posedi fidindajn materialojn. Sub helpo de instruisto ŝi projektis vento-generatoron, kiu estas malgranda, facile portebla kaj taŭga por la montvilaĝoj. Kamaradino Yuan iam vivis en la kamparo kaj bone konis la gravecon de elektro por ŝi. La malgranda generatoro projektita de ŝi alportis feliĉon al la kamparanoj.

La diplomitoj de la universitato profunde impresis min. Ili ne estas librovermoj sed laborantoj kun granda kreivo kaj kapablaj por praktiki siajn lernitajn sciojn. Tiel faras kaj diplomitoj de la natursciencaj fakultatoj kaj tiuj de la literaturaj fakultatoj. Inter ili troviĝas Liu Songyun, diplomito de la literatura fakultato. Dank' al dekjara esplorado kaj akumulado de materialoj li kompilis "Idiotismo de la Han-a

Lingvo" baldaŭ eldonotan, kun du milionoj da ideografiaĵoj. El tiu universitato fondita en la jaro 1958 jam diplomitiĝis dek du mil studentoj de diversaj fakoj. Ili estas bonvenaj ĝenerale por fabrikoj, lernejoj kaj institucioj. La universitato faris enketon pri 546 diplomitoj, el kiuj 7 funkcias kiel fabrikestroj, 31 kiel inĝenieroj kaj 46 kiel respondeculoj de diversaj niveloj. Rektoro Liu diris ankaŭ, ke iuj diplomitoj nun studas en aliaj landoj kaj aliaj daŭre studas kiel esplorantoj.


Tiu universitato estas la plej frue fondita en Tianjin inter la samspecaj universitatoj. Ĝi jam havas historion de 25 jaroj. La grizhara rektoro Liu, unu el ĝiaj fondintoj, estas tre sperta en funkciigado de lernejo. Li diris al mi, ke tiu sinteza universitato havas 19 fakojn kaj 85 grupojn kun 3 771 lernantoj, krom preparaj grupoj kun 800 lernantoj. La instruistoj parte estas profe-

siaj kaj parte kumulaj. Inter ili troviĝas profesoroj kaj 60% de la instruistoj atingis la nivelon de docento.

Same kiel al la aliaj universitatoj samspecaj, ankaŭ al ĝi mankas instruistoj. Ĉiu instruisto devas lekcii pri pluraj lernobjektoj. Instruisto Zhang Zhenguō lekcias, krom altmatematiko, ankaŭ pri teoria meĥaniko, materiala meĥaniko kaj inĝenierada meĥaniko. Krome, li kombinis sian instruadon kun scienca esplorado kaj uzis matematikon en muldado. Li atingis multajn sukcesojn en ŝparo de ŝtala likvaĵo, renovigo de teknologio kaj mildigo de laborintenseco kaj gajnis sciencon premion de Tianjin. Tie la laborariaj laborantoj estas tre kapablaj. Por ŝpari monon ili mem ekipis la laboratorion. Post trijara klopodado iu laboraria laboranto fondis aŭtonoman eksperimentan sistemon, dank' al kiu instaliĝis kvar eksperimentaj lernobjektoj, inkluzive de tiu pri programo regado.

La financo de la lernejo estas ne larĝa, kaj ĉiujare la ŝtato pagas nur 100 juanojn (50 dolarojn) meznombro por ĉiu lernanto. Pro tio la lernejo ne havas domegon por administrado kaj instruado. La lernantoj studas en pli ol dek unuetaĝaj klasĉambroj kaj pluraj prunteprenitaj klasĉambroj de kvin element-kaj mez-lernejoj. La instruistoj preparas siajn lecionojn en unu malalta kaj malvasta domo. Tamen neniu el ili plendis pri tiaj kondiĉoj. La supera instanco tre zorgis ilian vivon kaj laboron kaj elektis por ili terenon por konstrui novan domon. Iu gvidanto akompanis min al la konstruejo

Eksperimentado sub la gvido de instruisto



kaj ĝoje diris al mi: "Post nur du jaroj ni jam havos nian propran domon."

En Tianjin mi vizitis ankaŭ aliajn universitatojn de laboristoj kaj oficistoj kaj legis koncernajn materialojn pri tiuj lernejoj. Mi propraokule vidis, ke nun prosperas la altgrada eduko de laboristoj kaj oficistoj. Tianjin estas apudmara urbo kun longa historio kaj multe tretita de eksterlandaj agresantoj en la malnova Ĉinio. Tiam en la urbo estis koncesiitaj kvartaloj de naŭ fremdaj landoj. En 1949 liberiĝis Tianjin. Tiam ĝi estis urbo postiĝinta, 70% de la urbanoj estis analfabetoj. En la komenco de la kvindekaj jaroj la ĉefa tasko de eduko en Tianjin estis likvido de analfabeteco, kaj iom post iom fondiĝis elementaj lernejoj, mezgradaj lernejoj kaj uni-

versitatoj por laboristoj kaj oficistoj. Nun en la urbo funkcias jam 88 tiuspecaj universitatoj kun pli ol 50 mil lernantoj. Inter ili troviĝas 53 universitatoj sankciitaj de la ŝtato kun relative alta instrua kvalito. Laŭ la realaj kondiĉoj de la urbo tiuj universitatoj instalas 86 fakojn de ok kategorioj: Medicino, ekonomiko, politiko, inĝenierado, pedagogio, literaturo kaj historio, fremdaj lingvoj kaj kulturado de ŝtataj oficistoj. En la pasinta jaro tiuj universitatoj havis ĉ. 5 000 diplomitojn.

Por garantii la instruan kvaliton kaj kulturajn kompetentajn funkciulojn la universitatoj de laboristoj kaj oficistoj de Tianjin faras unuigitan ekzamenon kaj varbadon, uzas la ŝtatajn lernolibrojn kaj instruas laŭ la ŝtataj programoj kaj planoj. La studentoj de tiuj universitatoj, kiel tiuj

de la aliaj universitatoj, devas verki disertacion aŭ fari projekton kaj plenumi buŝan ekzamenon por diplomitiĝo. Kiu malbone plenumas la buŝan ekzamenon, ne povas diplomitiĝi.

Estis feliĉe, ke mi rigardis la ekspozicion de la projektoj de diplomitoj, kiam mi vizitis la universitaton de konstruaj laboristoj kaj oficistoj. Tie estis eksponitaj planoj de 45 studentoj. Ili projektis domojn por universitatoj, mezlernejoj, hospitaloj kaj fabrikoj, kaj ricevis laŭdojn de samprofesiuloj. Iliaj lernemo kaj sukcesoj kortuŝis min, kaj mi skribis jenajn vortojn: "Mi estas ĵurnalisto. Post la rigardo de tiu ĉi ekspozicio mi povus fari la konvinkan juĝon: Ĝi montras al la legantoj, ke tiuj universitatoj elbakis talentulojn."

En leciono





Sanhajaj emeritinoj ekskursas al Huangshan-monto.

HONG YING:

ILI ROLAS KIEL VIROJ

LA ĉinaj virinoj longtempe batalis por ŝanĝi sian maltan socian pozicion, liberiĝi el bagatelaj hejmlaboroj kaj fari sian kontribuon al la socio kiel viroj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, ilia deziro iom post iom realiĝas dank' al iom-post-ioma eliminado de kutima antaŭjuĝo malrespekti virinojn kaj altiĝo de ilia klereco. Tion pruvis la senĉese kreska proporcio de virinoj en la oficistaro kaj laboristaro en la lastaj pli ol tridek jaroj.

En la unuaj jaroj post sia fondiĝo la popola respubliko havis 600 000 oficistinojn kaj laboristinojn, t. e. nur 7.5% de la totala

nombro de oficistoj kaj laboristoj. Ĉe la fino de 1982 la nombro de laborantaj virinoj jam kreskis ĝis 40 930 000, t. e. 36.29% de la totala nombro. En la lastaj jaroj la virinoj kun aĝo de malpli ol 35 jaroj konsistigis 60% de la totala nombro de laborantaj virinoj. Ili diligente lernas kaj laboras kaj estas nemankigebla forto por la socialisma konstruado.

En la pasinteco la laborantaj virinoj troviĝis ĉefe en malpez-industriaj entreprenoj, tekstilaj fabrikoj, kulturaj, edukaj, sanprotektaj kaj financaj institucioj kaj iuj publikaj servoj. Nun ili havas sian lokon en ĉiuj branĉoj.

Kaj en la tekstila, financa, komerca kaj vestoprodukta branĉoj ili konsistigas 80% de la oficistoj kaj laboristoj kaj estas ĉefa forto en la produktado. En la branĉoj de mekanika kaj petrolkemia industrioj, agrikulturo, forstokulturo, akvoutiligo, financo, kulturo, eduko, higieno kaj scienca esplorado ili okupas trionon. Eĉ en la konstrua, fervoja, transporta, poŝta kaj telekomunika branĉoj, en kiuj pasinte laboris malmultaj virinoj, nun laboras sufiĉe multaj virinoj.

Dank' al la leviĝo de siaj socia kaj politika pozicioj multaj virinoj havas ŝancon de kleriĝo, pli

kaj pli multaj knabinoj ne nur finis la studon en elementa aŭ mezgrada lernejo, sed ankaŭ vizitis altlernejon. La altiĝo de ilia klereco faris ilin pli kompetentaj en ilia profesio. Mi prenu la Yunnan-an Ŝpin-tekstan Fabrikon kiel ekzemplon. El la 15 laboristinoj de ĝia prepara laboro, kiuj eniris en la fabrikon antaŭ la Liberiĝo, nur unu diplomitiĝis el supera mezlernejo. Sed el la 303 laboristinoj enirintaj en la fabrikon dum 1977-1982, 120 diplomitiĝis el supera mezlernejo kaj la ceteraj — el malsupera mezlernejo.

Por altiigi siajn edukitecon kaj teknikon multaj junaj laboristinoj aktive partoprenas en diversaj teknikaj kursoj funkciigataj de siaj entreprenoj, iuj eĉ studas en postlabora altlernejo aŭ mem lernas fakajn sciojn. La laboristaj sindikatoj kaj administracioj de multaj fabrikoj laŭeble kreis necesajn kondiĉojn, por ke laboristinoj ne interrompu sian lernadon pro hejmlaboro kaj flegado de infanoj. Ekzemple, la infanvartejo de la Nankina Radio-aparata Fabriko ĉiutage post laborhoroj restigas unu vartistinon



Guo Fengqin (dekstre), inĝenierino de la Karbominejo de Datong, interparolas kun vizitantaj mezlernejaninoj.

por plu zorgi la infanojn, kies gepatroj lernas en vespera lernejo. Krome ĝia laborista manĝejo ĉiufoje, kiam la vespera lernejo donas lecionon, preparas por la kursanoj malkaran kaj bongustan manĝaĵon. En la lastaj jaroj pli ol 90% de la laboristinoj vizitis la lernejon kaj ricevis altajn notojn. Kun la plialtiĝo de edukiteco kaj tekniko de virinoj la nombro de sciencistinoj kaj tek-

nikistinoj de la tuta Ĉinio kreskis de 1 670 000 en 1978 al 1 930 000 en 1982. La nombro de superaj fakulinoj en la naturscienca kampo jam atingis 6 580.

La salajrataj laborantaj virinoj manifestis siajn saĝon, talenton kaj kreivon en sia laboro. En 1982 la oficistinoj kaj laboristinoj de la urbo Dalian, Liaoning-provinco prezentis 5 000 renovigajn proponojn kaj faris 800 teknikajn reformojn, kaj per tio kreis por la ŝtato riĉaĵojn de miliono da juanoj. En 1980 oni okazigis manipulan konkurson de junaj ŝpinistoj kaj teksistoj de Pekino, Tianjin kaj Ŝanhajo. En ĝi partoprenis 220 000 gejunuloj, el kiuj estis 150 000 junulinoj. En 1982 oni organizis tutlandan konkurson de 11 laborspecoj de bankistoj, en kiu 9 ĉampionecojn gajnis virinoj.

Por honori la avangardajn virinojn en diversaj kampoj, la Ĉina Virina Federacio titolis ilin Ruĝflago-portanto de "Oka de Marto". En 1983 ĝi honoris per

Sun Aichun (la tria de dekstre) dum virina kongreso



tiu titolo 10 000 virinojn laborantaj en industria, trafika, financa, komerca, eduka, sanprotekta kaj scienca kampoj. Inter ili estas:

Li Gongji, juna laboristino de la Pekina Kvara Tapiŝ-fabriko. Ŝi faris pli-ol-2 000-fojan eksperimentadon en dek kvar monatoj, akumulis dekmil donitaĵojn kaj fine trovis sciencan metodon por tinkturi lanon. Ŝia metodo altiĝis la labor-efikon dekoble kaj ŝparis la tinkturon je 90%.

Wei Yu, docentino de la Nankina Politekniko en Jiangsu-provinco. Dum sia studado eksterlande ŝi plenumis esploran temon kun brila sukceso kaj fari-

ĝis la unua elektronika doktorino de Ĉinio.

Li Furu kaj ŝiaj kvin kolegoj, laboristinoj de la Unua Radioaparata Fabriko de Jiaozuo, Henan-provinco, memvole iris al laborejo kun plej malfacilaj laborkondiĉoj. Ĉiumonate ili faras po 700 laborpecojn, je 200 pli multe ol la viroj, kaj iliaj produktaĵoj estas bonkvalitaj.

Tang Sixiao, estro de la Koaksiga Fabriko de la Baotou-a Ŝtala Kompanio en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Ŝi en aĝo de pli ol kvindek jaroj, ankoraŭ persiste faras eksperimenton ĉe koaksoforno. Ŝi multe kontribuis kaj fariĝis metalur-

gia specialistino, trifoje partoprenis en tutlanda kunveno de avangardaj laborantoj kaj ricevis laŭdojn de la Ŝtata Konsilantaro.

Iuj timas, ke havigi al virinoj okupon malhelpos ilian feliĉan familian vivon. Sed fakto atestas, ke multaj laborantaj virinoj, kiuj atingis brilajn sukcesojn en sia laboro, estas bonaj edzinoj kaj bonaj patrinoj, kaj ilia familia vivo estas harmonia kaj feliĉa. Sun Aichun, sindikata komitatano pri virinaj aferoj de la Pingdingshan-a Kemi-sterka Fabriko en Henan-provinco, kuraĝe defendas la interesojn de la virinoj en sia fabriko. Laboristinoj laŭdis ŝin kiel sian fidindan amikino. Hejme ŝi estas bona

Junulinoj de la Ĵurnala Servo de la Liaoyuan-a Loĝkvartalo de Sanhajo distribuas ĵurnalojn.



mastrino. Ŝi bone prizorgas siajn edzojn, pacience edukas siajn infanojn kaj aktive helpas siajn najbarojn. Tial ŝia loĝkvartalo titolis ŝian familion "modela familio" dufoje en la lastaj du jaroj.

Kompreneble, oni ne povas aserti, ke la tradicia diskriminacio al virinoj jam tute eliminiĝis en Ĉinio. Ĵurnaloj iam malkaŝis, ke iuj unuoj ne volas akcepti diplomitajn studentinojn. En iuj lokoj la virinoj ne povas ricevi egalan salajron kiel la viroj, farrante saman laboron. Tamen tiaj diskriminacioj estas ofte kritikataj kaj eĉ riproĉataj de justa publika opinio. Kiam ofiĉistino aŭ laboristino estas brutale traktita aŭ turmentita, ŝiaj estroj kaj laborista sindikato eliris por ŝin defendi. Ekzemple, Sun Shulan, sindikata komitatano pri virinaj aferoj de fabriko de karbominejaj maŝinoj, solvis

48 seriozajn familiajn konfliktojn dum la pasintaj tri jaroj kaj defendis laŭleĝan rajton de virinoj.


Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ŝtato donis grandan atenton al la laborprotekto de la virinoj, sed dum la dekjara tumulto periodo de la kultura revolucio oni neglektis tion. En 1979 ĉiuj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj faris ĝeneralan kontrolon al la laborprotekto de laboristinoj kaj trovis ke iliaj laborprotektaj reguloj estas neperfektaj kaj la morbokvanto de virinaj malsanoj en iuj regionoj kaj entreprenoj estas tre granda. En la lastaj jaroj ili ellaboris aŭ perfektigis siajn laborprotektajn regulojn kaj rimedojn, laŭ la ŝtata difino kaj siaj konkretaj kondiĉoj, por ke la virinoj estu prizorgataj en la periodo de menstruo, gravedo, akuŝado kaj mamnutrado.

Cetere, infanvartejoj kaj infanĝardenoj jam ĝenerale stariĝis tra la lando, tiel ke la virinoj povas bone labori. Ekzemple, la nombro de infanvartejoj kaj infanĝardenoj kreskis de 93 000 en 1979 al 121 000 en 1982, kio multe solvis la malfacilon.

Ĉinoj ŝatas diri: "La virinoj povas subteni duonon de la ĉielo." La ĉinaj virinoj montras per siaj agoj, ke ili vere ludas tian rolon en la nacia konstruado.



LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Tianjin
3. Jinan (Shandong-provinco)
4. Chongqing (Sichuan-provinco)
5. Ŝanhajo
6. Jiangmen (Guangdong-provinco)
7. Guizhou-provinco
8. Dedu (Heilongjiang-provinco)
9. Qinhuangdao (Hebei-provinco)
10. Zhongning (Ningxia-a Hujnacieca Aŭtonoma Regiono)
11. Shaanxi-provinco
12. Jiangsu-provinco



JELEZO*:

Esperanto kaj reformado de la ĉina skriba lingvo

La aŭtoro

EN sia historio la ĉina Esperanta movado havis striktan interligon kun la reforma movado de la ĉina skriba lingvo, kio okazis en la tridekaj jaroj de la kuranta jarcento.

Ni, ĉinoj, tiam troviĝis en la tempo, en kiu ni multe suferis de la agresado de eksterlandaj malamikoj kaj leviĝis kontraŭ ili por nia liberiĝo. En 1931 la japana imperiismo okupis la tri provincojn de nordorienta Ĉinio, kaj tuj poste etendis siajn ungegojn al norda Ĉinio. La reakcia registaro de Kuomintang genuiĝis antaŭ la agresantoj kaj ne permesis al la popolo sin levi por rezisto. La nacisava movado ŝtormis tra la lando, eĉ parto de la Kuomintangaj trupoj malobservis la volon de la registaro kaj ekrezistis kontraŭ la provoko de japanaj trupoj. Jen evento, kiu okazis en la 28-a de januaro 1932, en Ŝanhajo.

Ĝuste tiam oni fondis en Ŝanhajo la Ŝanhajan Esperantistan Ligon, kun slogano "Per Esperanto por la Liberiĝo de Ĉinio". Evidente, ne ekzistis la Esperanta movado en Ĉinio sen liberiĝo de la lando.

Dume inter la ĉinaj elmigrin-

toj en Sovetunio naskiĝis projekto "Sin Wenz" por literumi la malfacilajn ĉinajn ideografiaĵojn per latinaj literoj. Tiam 100 000 ĉinaj laboristoj loĝis en la plej orienta regiono de Sovetunio. Plejparto de ili estis analfabetoj. Oni malsukcesis likvidi ilian analfabetecon per ĉinaj ideografiaĵoj. Por tuj atingi la celon, oni devis krei latinan skribon facile lerneblan por ili. Tiam ĉinaj komunistoj Qu Qiubai, Wu Yuzhang kaj Xiao San (Emisiao), kiuj estis en Sovetunio, studis la fonetikan literumadon de la ĉina skriba lingvo. Ili prenis sur sin la taskon reformi la ĉinan skriban lingvon kaj, en kunagado de la sovetunia lingvisto A. A. Dragunov kaj aliaj, finfine ellaboris en 1931 novan projekton de latinigo de ĉinaj ideografiaĵoj, kiun ili prezentis al la samcela kongreso en Harbarovsk en tiu jaro por ĝin diskutu kaj oficialigi, pri kio ne informiĝis la enlandanoj, ĉar tiam Ĉinio ne havis diplomatian rilaton kun Sovetunio.

Qu Qiubai, fama ĉina komunisto, estis eminenta literatura kaj arta teoriisto kaj ĉinigisto de sovetuniaj literaturaĵoj. Li long-

tempe studis la problemon pri reformado de la ĉina skriba lingvo kaj faris plurajn projektojn de latinigo de la ĉinaj ideografiaĵoj. Oni trovis en liaj postlasitaj manuskriptoj ĉapelitajn literojn proprajn al Esperanto, kio montris, ke li iam lernis Esperanton. Wu Yuzhang, gvidanto de la movado de reformado de la ĉina skriba lingvo, estis ankaŭ fervora subtenanto de nia movado. Xiao San, fama ĉina poeto, longtempe loĝis en Eŭropo. En 1933 lia artikolo "La Latinigo de la Ĉina Skriba Lingvo" estis esperantigita kaj publikigita en "La Nova Etapo", organo de la Internacia Asocio de Revoluciaj Verkistoj. La veterana ĉina esperantisto Tikos ĉinigis kaj publikigis ĝin en iu gazeto eldonita en Ŝanhajo, la unuan artikolon aperintan en Ĉinio por konigi novan specon de latina skribo. En sia artikolo Xiao San prezentis alfabeton, en kiu troviĝis 28 literoj: A B C CH D E F G I J K L M N NG O P R RH S SH T U W X Y Z ZH. Kiel prononci tiujn literojn kaj kiel literumi la ĉinajn ideografiaĵojn per ili? Ni trovis nenian klarigon en la

(daŭrigo sur p. 22)

Amiko de Esperanto — ĉina elstara muzikisto He Luting

KUN granda plezuro mi akceptis la peton de la redakcio de "El Popola Ĉinio" konigi al la legantoj la vivon de ĉina veterana muzikisto He Luting kaj lian aprobon al Esperanto. Mi sentas aparte grandan honoron, ke kiel lernanto de s-ro He Luting, mi havas la ŝancon skribi tiun raportaĵon, kiam la urbo Ŝanhajo solene celebras la 80-an datrevenon de lia naskiĝo kaj la 60-an datrevenon de lia okupiĝo pri muziko.

En 1903 He Luting naskiĝis en iu vilaĝo de suda Ĉinio. En 1923 li komencis lerni muzikon. En 1934, kiam li ankoraŭ estis malriĉa lernanto de la Ŝtata Muzika Kolegio, li debutis kun granda sukceso en la internacia konkurso "Ĉinstilaj Pian-komponaĵoj" kaj gajnis la unikan unuan premion de la konkurso per sia genia pian-komponaĵo "Fluto de Paŝtisteto" kun profunda amo al la patrolando kaj hejmloko. Lia alia komponaĵo "Lulila Melodio" gajnis la duan premion. Ekde tiam la nomo de He Luting iom post iom famiĝis en Ĉinio kaj nun estas konata preskaŭ de ĉiuj.

Sinjoro He Luting estas ne nur komponisto, sed ankaŭ teoriisto, edukisto kaj aktivisto de muziko. Krome, li estas ankaŭ membro de la organizo "Amikoj de Esperanto" konsistanta el ĉinaj famaj personoj.

Kiel komponisto, en la pasintaj 60 jaroj li kreis pli ol 200 diverstipajn voĉ-muzikaĵojn, inkluzive de ĥoraĵoj, solkantoj kaj operoj, 26 filmajn muzikaĵojn kaj 7 orkestrajn muzikaĵojn kaj pian-komponaĵojn. Lia tuta verkaro strikte ligiĝas kun la liberiga afero kaj la revolucia batalo de Ĉinio. Ekzemple la "Kanto de Partizana Taĉmento" verkita de li dum la Kontraŭjapana Rezistmilito ĝis nun ankoraŭ cirkulas en la ĉina popolo. Ĝia melodio vivece priskribas la heroismon de bravaj partizanoj batalantaj por la nacia liberiĝo kaj kortuŝajn scenojn, kiel ili sagace surprizatakis kaj venkis la malamikojn en densaj arbaroj kaj sur altaj montoj.

Kiel muzika teoriisto, li verkis pli ol cent disertaĵojn, trafe eksplikante siajn pensojn pri arto, estetiko kaj edukado. Tiuj verkoj havas profundan direktan

signifon por la disvolviĝo de la muzika afero de Ĉinio.

Kiel muzika edukisto, frue antaŭ la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, li jam elkulturis multe da muzikaj talentuloj en Wuhan, Chongqing, norda Jiangsu-provinco, norda Shaanxi-provinco kaj aliaj lokoj kaj pretigis por la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito de Ĉinio nemalmulte da eminentaj propagandistoj. En la pasintaj pli ol 30 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, li laboris kiel rektoro de la Ŝanhaja Konservatorio kaj elbakis milon da muzikistoj, el kiuj iuj jam fariĝis spina forto de la ĉina muzika rondo kaj aliaj gajnis gloron internacie por la patrolando.

Kiel muzika aktivisto, li estas vicprezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj la Ĉina Muzikista Asocio kaj prezidanto de la Ŝanhaja Filio de la Ĉina Muzikista Asocio. Li funkciis kiel membro de prijuĝa komitato en internacia muzika konkurso kaj plurfoje ĉeestis internacian muzikan kon-



He Luting kaj la aŭtorino

ferencon kiel reprezentanto de Ĉinio. Septembre de 1983, en la Konferenco de la Internacia Muzika Konsilantaro okazinta en Svedio, oni unuanime elektis sinjoron He Luting kiel honoran membron de la Konsilantaro, unikan el Ĉinio, pro liaj eminentaj sukcesoj en la muzika afero. Tio ja estas gloro rekompence al lia senrezerva sindediĉo al la muzika afero kaj ankaŭ fiero de la ĉina popolo.

Pri Esperanto mi scias ne multe. Tamen mi kun plezuro konsentis viziti sinjoron He Luting, kiam redaktoro de "El Popola Ĉinio" informis min, ke li estas membro de la organizo "Amikoj de Esperanto" kaj ke eksterlandaj esperantistoj deziras koni tiun amikon.

Mia vizito okazis ĝuste post kiam li ĵus ricevis operacion pro stomaka malsano. Vidinte lin malforta, mi iom hezitis, ne sciante kiel motivi mian viziton. Sed sinjoro He tre ĝojiĝis pri nia alveno kaj montriĝis tre vigla kvazaŭ li ne estus malsana. Li multe parolis pri siaj opinioj rilate la muzikan teorion kaj muzikan edukadon kaj kelkfoje li eĉ iris al la librobretaro por serĉi koncernajn librojn por sin argumenti. Li faris tion same kiel antaŭ multaj jaroj, kiam li instruis al mi muzikan teorion kaj kritikis miajn verkojn intime kaj detale. Tio rememorigis min pri lia persisteco en la vero. Kiam mi menciis Esperanton, li ekridis kaj kun granda intereso ekparolis al mi, kia lingvo estas Esperanto kaj kiel li lernis ĝin dum

sia juneco. Kvankam li ne sukcesis ĝin ellerni pro nestabila vivo kaj manko de necesaj kondiĉoj, tamen li tre aprobas ĝin kaj esperas, ke Esperanto estos mastrata de ĉiam pli multaj homoj en Ĉinio kaj la tuta mondo. Li kredas, ke popularigite, Esperanto povos doni fortan helpon al la homaro.

** La aŭtorino estas membro de la Konsilantaro de la Ĉina Muzikista Asocio kaj vicprezidanto de la Ĉina Instituto de Filma Muziko.*



Por pli bone servi al la urbanoj

—Vizito al la Agrikultura-Industria-Komerca Kombinato Changjiang de Chongqing

HA, kiel freŝaj fiŝoj! — laŭdis maljunulino kun vivaj fiŝoj en la mano en fiŝvendejo de la kombinato.

La bela monturbo Chongqing, situanta ĉe la kunfluejo de Jangzi-rivero kaj ĝia branĉo Jialing, estas la plej granda industria urbo en la sudokcidenta parto de Ĉinio. En la jaroj post sia fondiĝo la kombinato ofte liveras al la urbanoj freŝajn agrikulturajn produktaĵojn. En la pasinta vintro mi vizitis la kombinaton.

ENTREPRENO DE NOVA TIPO

En modesta ofidomo de la kombinato, ĝia funkciulo afable akceptis min. Li proponis al mi glason da jasmena teo produktita de la kombinato mem, kaj respondis al miaj demandoj.

La kombinato estis fondita en marto de 1979. Ĝi konsistas el 26 ŝtataj kultivejoj kaj 78 po-detalaj vendejoj. La 12 000 laboristoj kaj oficistoj de la kombinato prizorgas fruktoĝardenojn, teĝardenojn, fiŝlagetojn kun totala areo de dek mil hektaroj. Krome ĝi havas 44 manĝaĵ-prilaborejojn kaj kompaniojn de laktaĵoj, konstruado, fiŝado k.a. Krom tio ĝi kunlaboras kun pli ol 1 800 produktaj brigadoj en la antaŭurbo. Ĝi estas novtipa ekonomia unuo aperinta post la komenco de reformado al la ĉina ekonomia sistemo.

La gastiganto rememoris, ke la 26 ŝtataj kultivejoj antaŭe estis investitaj de la ŝtato. La tuta profito de la kultivejoj apartenis al la ŝtato kaj la laborantoj de la kultivejoj estas salajrataj de la ŝtato. Ĉar la spezado de la kultivejoj ne influis la enspezon de la laborantoj, la iniciatemo en produktado ne povis esti plene disvolvita. Cetere, la produktaj planoj estis ellaboritaj de supera instanco, kaj la rikoltaĵoj devis vojaĝi tra aĉetejo,

distribuejo kaj fine al la vendejo. Kiam la produktaĵoj enmerkatiĝis, ili jam malfreŝiĝis kaj multaj el ili putriĝis. Tio longtempe malprofitigis la kultivejojn. Sole en la periodo de 1967-1978, la defcito de la 26 ŝtataj kultivejoj atingis 24.67 milionojn da juanoj.

En la lastaj jaroj, la kombinato ekhavis iagradan rajton mem ellabori planon de kultivado, kaj ĉe la divido de profito estis konsiderataj kaj la nombro de akcioj de diversaj branĉoj kaj la kvanto de liveritaj produktaĵoj. La principo “pli da rekompenco por pli da kontribuo” stimulis la aktivecon de la laborantoj. La kultivejoj mem prilaboras kaj vendas produktaĵojn, kio multe mallongigis la vojaĝon de la produktaĵoj. En la pasintaj 5 jaroj post sia fondiĝo la kombinato havis 21.7 milionojn da juanoj da neta profito, post pago de 11 milionoj da juanoj kiel imposto.

Prave diras la proverbo: “Unu vido pli taŭgas ol dek aŭdoj.” La gastiganto proponis al mi rigardi kelkajn el ĝiaj kultivejoj.

PLI DA FREŜAJ FIŜOJ AL LA URBANOJ

Frumatene de la sekvanta tago, mi venis al la fiŝbredejo de Changshou-lago. En vintro nebulo ofte vualas la urbon kaj mi ne klare vidis la verdajn kampojn ambaŭflanke de la vojo.

La lago estis formita en konstruado de akvo-konservejo en la kvindekaj jaroj. Laborantino de la bredejo Nie Zhenqun diris al mi, ke mi malfruis unu tagon, ĉar ĝuste hieraŭ oni finis fiŝkaptadon kaj kaptis 9 tunojn da fiŝoj per unu reto.

“Sed tio ne estas mirinda,” diris Nie, “Oni kaptis maksimume 230 tunojn da fiŝoj per unu

reto." Sed antaŭ la fondiĝo de la kombinato, la fiŝbredejo ne havis rajton vendi fiŝojn podetale. Ĉiuj ĝiaj fiŝoj devis esti distribuataj de la urba akvoprodukta kompanio. Pro neĝustatempa elportado de fiŝoj kaj manko de fridujoj al la fiŝbredejo somere multe da fiŝoj putriĝis. Eĉ se la kompanio ĝustatempe forportis la fiŝojn, oni kutimis unue konservi la fiŝojn en fridigaj tenejoj 2-3 tagojn kaj poste distribui ilin al butikoj. En tiaj kondiĉoj estis malfacile por la urbanoj ĝui freŝajn fiŝojn, por ne paroli pri vivaj fiŝoj. Sed nun, la fiŝbredejo povas mem vendi la kaptitajn fiŝojn je la prezo difinita de la ŝtato.

Nie diris al mi, ke domaĝo alportita de putriĝo de fiŝoj malaltiĝis de 5% al 1% kaj sole pro tio ĉiujare la fiŝbredejo akiris kvindek mil juanojn.

OPORTUNE POR PRILABORADO

Sichuan estas provinco plej abunde produktanta mandarinon en Ĉinio, kaj tiuflanke Chongqing antaŭiras en la provinco.

Mi iris viziti fruktoĝardenon Jinyunshan, kiu produktas ĉiujare 680 tunojn da mandarinon. Ambaŭflanke de la aŭtovojo, sur la montodeklivoj, ĉe la rivero Jialing, ĉie prosperas fruktarba-

roj. La estro de la ĝardeno kondukis min al vasta arbaro sur montodeklivo kaj deprenis mandarinon por ke mi gustumu. La frukto estis vere bongusta.

En la ĝardeno aŭdiĝis de tempo al tempo kantoj kaj ridoj. Grupoj da gejunuloj estis plukantaj mandarinon. La branĉoj estis klinitaj de densaj fruktaroj apenaŭ eltenante la pezon. Parto de la fruktoj estis rekte prilaboritaj en la ĝardeno.

Mi rigardis kelkajn prilaborejojn de manĝaĵoj de la kombinato. Ili enladigas mandarinon kaj produktas limonadon, fruktosukon kaj altklasan tonikon. La skalo de la prilaborejoj estas tre malsamaj, sed ĉiuj iliaj krudmaterialoj estas liverataj de la kombinato mem. Pro tio iliaj prilaboraĵoj estas pli freŝaj ol tiuj de manĝaĵfabriko sen kultivejoj.

La kombinato plene utiligas siajn produktaĵojn. Antaŭe la ŝeloj de mandarinon estis forĵetitaj. Sed nun ili estis prilaboritaj en medikamentojn kaj industriajn materialojn. Tie produktiĝas citrono malgranda, sed tre oleeca. Antaŭe neniu volis aĉeti ilin por prilabori, ĉar la profito estis tro malgranda. Nun la kombinato mem prilaboris la citronojn por akiri oleon.

Manĝaĵ-prilaborejo





Oranĝarbaro de la kombinato

UNUAJ SUKCESOJ

Statistiko de la kombinato diris, ke en la lastaj jaroj ĝi liveris 80 procentojn de lakto bezonata de la tuta urbo, 20 procentojn de fruktoj, 30 procentojn de teo, kaj 15-20 procentojn de fiŝoj. La akumulita produkta kapitalo de la kombinato estis uzata ĉefe por establi aŭ plivastigi teĝardenojn, fruktoĝardenojn, bovinbredejojn kaj fiŝbredejojn.

Progreso de la produktado havigis al multaj senlaboruloj profesion. En la lastaj kvin jaroj la kombinato varbis pli ol 500 laborulojn kaj ĉiujare ĝi bezonas ĉ. 3 000 kontraktajn laborulojn. Parto de la laboruloj de la kultivejoj estis abiturientoj de mezlernejoj. Iuj el ili jam edziĝis en la kultivejoj. Ilia vivo estas stabila. Kelkaj geedzoj de la fiŝbredejo de Changshou-lago diris al mi, ke ilia monata enspezo estas ĉ. 100 juanoj, sed la varprezoj estas tre malaltaj, kaj ankaŭ la lupago de domo kaj pago por elektro kaj akvo estas tre malaltaj, tial ili havas ĉiumonate malgrandan sumon da superflua mono. Kelkajn jarojn antaŭe la fiŝbredejo havis nur 4 komunajn televidilojn, sed nun du trionoj de la familioj havas sian propran televidilon. La vestoj de la gejunuloj estas neniom malpli bonaj ol tiuj de la urbanoj.

Ankaŭ la produktaj brigadoj de la kombinato enspezas pli multe ol antaŭe, kaj senĉese pliboniĝas la vivo de la kamparanoj. Mi venis al la brigado Yakou. La brigado havas 37 familiojn kun 134 personoj. Antaŭe ĉiu homo de la brigado ĉiujare profitis meznombro el tekulturado nur

40 juanojn. Sed de post la establiĝo de la kombinato, la enspezo kvarobliĝis. Multaj familioj konstruis por si novan domon kaj aĉetis novajn meblojn. Antaŭe tie nemal multe da junuloj aspiris labori en urbego, sed nun ili tre volentas resti en la kamparo.

Aparte menciinde estas, ke la kombinato pretigis favorajn kondiĉojn por progresigi teknikojn kaj kulturis necesajn fakulojn. La kombinato nun havas 6 esplorajn instituciojn pri fruktokulturado, bovinbredado, fiŝbredado k.a. Ĝi sume kulturis 350 agronomiajn teknikistojn kaj organizis dekojn da trejnaj kursoj. La Esplora Instituto pri Akvoproduktaĵoj en la fiŝbredejo de Changshou-lago la unua en la lando gajnis sukceson en arta ovometigado kaj arta kovado de ĉina sturgo kaj kulturis 200 mil sturgidojn. La sukceso estis premiita de supera instanco.

Tamen la kombinato faris nur unuajn paŝojn. Ĝi ankoraŭ ne povas liveri sufiĉan kvanton da lakto kaj fiŝo al la urbanoj. Por ke ĝi fortiĝu pli rapide, la ŝtato permesis al ĝi ne doni al la ŝtato profiton antaŭ 1985.

Forlasonte la urbon, mi estis informita, ke la kombinato jam planis fondi esplorajn instituciojn de tekulturado kaj manĝaĵo, bazojn de fiŝidoj, bonspcaj fruktarbidoj kaj bonrasaj virbovoj, kaj prilaborejojn de furaĝo.

Espereble la kombinato liveros pli da bonkvalitaj kaj malmultekostaj produktaĵoj al Chongqing.

Ŝanhaja Postlabora Politekniko

Teksto kaj fotoj de HUANG TAOPENG


La Ŝanhaja Postlabora Politekniko estis fondita en 1960. Ĝiaj pli ol 10 000 diplomitoj laboras en pli ol 1 400 fabrikoj, kaj jam faris pli ol 2 000 teknikajn reformojn kaj inventojn. Statistiko diris, ke pli ol 500 el ili fariĝis labormodeloj, fabrikestroj, inĝenieroj, laborejestroj aŭ estroj de teknika sekcio.


La politekniko havas tri fakultatojn de mekanika inĝenierado, kemia inĝenierado kaj aŭtomata regado kun ok fakoj. Ĝi akceptas lernantojn kun klereco de alta mezlernejo. Nun en ĝi studas pli ol 4 000 laboristoj kaj oficistoj salajrataj. La lernantoj lernas tuttage kvar jarojn aŭ duontage 4-5 jarojn, kaj ilia klereco post diplomitiĝo identas al tiu de diplomitoj de normaj universitatoj, dum la pli ol 20 faksciaj kursoj, ekzemple de komputero, havigas al lernantoj klerecon identan al tiu de diplomitoj de kolegioj. Cetere, la politekniko ofte okazigas provizoran kurson de teknologio kaj produkta administrado.




Li Lianguo, membro de la Konstanta Komitato de la Ŝanhaja Popola Kongreso, studas en la politekniko.

Profesoro Pan Zhencang, estro de la mekanika fakultato, donas lecionon.






Lernantoj praktikas en komputila ĉambro.



En kemia eksperimentejo



Docento Ni Zupeng, vicestro de la fakultato de aŭtomata regado, helpas studentojn en esplorado.

Vicprofesoro Li Gaojing (la tria de dekstre) kaj liaj lernantoj faras teknologian analizon.





Diplomitiĝa projektado sub la direktado de vicprofesoro Xue Zude

Li Fang kaj ŝia edzo Chen Guozong estas samklasanoj. La foto montras ilin hejme en diplomitiĝa projektado.



Li Zhongning, diplomito en 1981, laboras en la Ŝanhaja Sesa Fabriko de Transistoraj Aparatoj.






Zhuang Dekai, inĝeniero de la Ŝanhaja Tria Bicikla Fabriko, sukcesis en pli ol 30 teknikaj reformoj post diplomitiĝo el la politekniko. Pro la kontribuo li estis elektita tutlanda labormodelo.



Inĝeniero Shi Rongdu, fabrikestro de la ŝanhaja paperfabriko Lixin, sukcesis en biologia traktado de malpura akvo.

Leciondonado farata de docento Huang Qingyun estas videoregistrata en la video-centro de la politekniko.



En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵojn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekomencas pro la kontribuoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO de E. Privat. La unua parto (74 p.) kaj la dua parto (199 p.) ofsete represitaj kaj kunmetitaj en unu broŝuron. Eldonita de la Internacia Esperanto-Instituto (Nederlando). Prezo: 5.50 gld.

Jen verko tiel populara de aŭtoro tiel eminenta, ke tute superfluas komento aŭ rekomendo pri ĝi. Sendube ĝi estas unu el la plej gravaj historiaj verkoj pri la movado de Esperanto.

Ĝi kovras nur la periodon 1887 — 1927, t. e. la unuajn 40 jarojn de la lingvo, do ĝi ne donas panoramon de la Esperanta historio. Iuj kritikemaj legantoj eble dirus, ke mankas al ĝi tiu aŭ tiu detalo kaj mencio de tiu aŭ tiu merito-plena persono, kaj rimarkigus arkaismojn kaj korektendaĵojn en

ĝiaj lingvaĵoj; aliaj eble dirus, ke hodiaŭ post apero de kolektoj de historiaj materialoj pri Esp-movado, oni devus krei kompletan verkon pri la preskaŭ centjara historio de nia movado. . .

Ĉu do estas inde represi tian verkon hodiaŭ?

Mi opinias, ke jes. La verko estas represinda ne nur pro sia historia merito kaj la bonstila lingvo de la aŭtoro, sed ankaŭ pro aktuala rolo, kiun ĝi povas ludi hodiaŭ. Ĝi estas leginda ne nur por la novicoj, sed ankaŭ por iuj veteranoj. Multaj okazaĵoj priskribitaj en la verko servos kiel motoro por aktivigi kaj revigligi la esperantistaron. La fervoro de la pioniroj, la iniciatemo de la fervoruloj, la brilaj sukcesoj de iliaj klopodoj, la multe promesantaj aranĝoj kaj la organizoj en tiu periodo. . . vibrigas la koron de la hodiaŭaj daŭrigantoj de la afero.

Tiu ĉi verko ĉiam restos atesto pri la meritoj de niaj pioniroj kaj kuraĝigos la estontajn adeptojn de Esperanto. Kaj kun ĝojo mi informas la legantojn de EPĈ, ke jam aperis nova kompleta ĉina traduko de tiu ĉi Privat-aĵo en Pekino. La ĉinigon plenumis Honfan, unu el la plej fruaj membroj de la redakcio de nia gazeto.

Retrorigardo de la pasintaĵoj kaj resumo de la spertoj tre necesas kaj tre utilas por plisaĝigi kaj lertigi nin. Starante ĉe la sojlo de la baldaŭ okazonta Centjara Jubileo de Esperanto, certe multaj samideanoj deziras aperon de novaj verkoj pri la historio de E-movado. Kredeble diligentaj manoj jam energie sin okupas per skribado de tio. Mi esperas, ke la novaj verkoj pri la centjara historio ne nur kuraĝigos per la pioniraj fervoroj kaj glorioj, sed ankaŭ pli bone prilumigos la estontan vojon per ĉiuj gravaj lecionoj pri sukcesoj kaj malsukcesoj en la pasinteco.

Recenzis **LAŬLUM**

«Historio de la Lingvo Esperanto» kaj ĝia ĉinlingva traduko



Nove ricevitaĵoj

INFANOJ EN HIROSIMO de Yamaguti Yuuko, esperantigita de Tanaka Sadami, ilustrita de Tanaka Yasô kaj Lumi, eldonita

**MEMORIGAJ AKTIVADOJ DE
ĈINAJ ESP-ISTOJ**

Decembre de 1983, ĉinaj esperantistoj en pli ol tridek urboj grandaj kaj mezgrandaj organizis diversajn aktivadojn memore al la 44-a datreveno de la surskribo de prezidanto Maŭ Zedong por la esperantistoj de Yan-an kaj la 124-a datreveno de la naskiĝo de doktoro Zamenhof. La Esperantaj organizoj de Pekino, Ŝanhajo,

Kantono, Hangzhou, Chengdu, Wuhan, Xi-an, Zhengzhou kaj aliaj aranĝis memorkunvenojn. S-ro Chen Yuan, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj lingvisto, faris raporton pri sia eŭropa vojaĝo en la memorkunveno de Pekino. S-ro Liu Hongkang, prezidanto de la Sichuan-a Esperanto-Asocio, parolis en la kunveno de Chengdu, kiel prezidanto Maŭ faris surskribon por la esperantistoj de Yan-an. Pli ol sescent esperantistoj el diversaj lokoj de Guangdong-provinco kolektiĝis en Kantono kaj festis la naskiĝtagon

de Zamenhof per memverkitaj programeroj.

La Esperanto-Asocioj de Kunming, Huhhot, Nanning, Dandong kaj aliaj ĉe landlimaj regionoj okazigis raport-kunvenojn aŭ kunsidojn por konigi la vivon de Zamenhof kaj la E-movadon en-kaj ekster-landan kaj interŝanĝi sperton. En Changchun kaj Sanmin oni aranĝis ekspoziciojn de Esperantaj libroj kaj gazetoj. En la urbo Fushun okazis inaŭguro de la unua E-kurso kun cent tridek lernantoj. Ili esprimis, ke ili re-



La Wuhan-a Esperanto-Asocio kunvenas por festi la 124-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.

de la Japana Esperanta Librokooperativo. Kolekto de japanaj rakontoj. Formato: 12.5 × 18 cm. 64 p. Prezo ne montrita.

**XVIII-AJ INTERNACIAJ FLO-
RAJ LUDOJ** kolekto de beletraĵoj, eldonita de la Eldona Fakto de la Hispana Esperanto-Federacio. Formato: 12 × 18 cm. 78 p. Prezo ne montrita.

KVIN UNUAKTAĴOJ de Arthur Schnitzler, tradukita de d-ro Leopold Grimme k. a., eldonita de la Aŭstria Esperanto-Instituto. Formato: 14 × 20.5 cm. 68 p. Prezo ne montrita.

LA TRANSDORSOĴETO de J. Novak. I. Špička kaj V. Hnik. Li-

bro pri ĵudo, eldonita de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Formato: 15 × 20 cm. 70 p. Prezo ne montrita.

LA VERDA RELO beletra antologio pri la fervojo, eldonita de la Kooperativo de Literatura Foiro. Formato: 14.5 × 20.5 cm. 66 p. Prezo: 15 germanaj markoj.


NI VIVOS! originala dramo pri Lidia Zamenhof, verkita de Julian Modest. Eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 54 p. Prezo: 8.10 gld.

AKADEMIAJ STUDIOJ 1983 kolekto de prilingvaj artikoloj, kompilita de R. Eichholz, eldonita de Esperanto Press. Formato: 21 × 29 cm. 208 p. Prezo: \$10 plus \$2.00 por sendkosto.

ILUZIOJ originala novelaro de Lorjak, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 19.5 cm. 184 p. Prezo: 18 gld.

**METAMORFOZOJ — LA IN-
FRAREALO DE NIA EPOKO** albumo de pentraĵoj de Michel C. Jullian kun tekstoj en Esperanto krom la franca, germana kaj angla. Formato: 29 × 30.5 cm. 198 p. Prezo: 58 germanaj markoj.

**ESPERANTO EN LA MODER-
NA MONDO** artikoloj pri lingvaj problemoj kompilitaj de Rüdiger kaj Vilma Sindona Eichholz, eldonita de Esperanto Press. Formato: 15 × 20 cm. 576 p. Prezo: US \$ 25. Mendebila ĉe la kanada eldonejo.



S-ro Chen Yuan raportas pri sia vojaĝo en Eŭropo.

memoras tiujn du signifajn tagojn per bona lernado de nia lingvo.

LA ĈINA TRADUKO DE "HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO" ELDONITA

Decembre de 1983, la ĉina eldonejo "Scioj" eldonis la ĉinan tradukon de la libro "Historio de la Lingvo Esperanto" verkita de esperantologo kaj literaturisto Edmond Privat. Ĝin ĉinigis ĉina esperantisto Honfan. Chu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko kaj prezidanto de "Amikoj de Esperanto", skribis por ĝi enkondukon, en kiu li emfazis: "La disvolvo de la E-movado havas ekstreme gravan aktualan signifon kaj ankaŭ brilan esperon kaj perspektivon. La libro 'Historio de la Lingvo Esperanto' verkita de doktoro Edmond Privat de Svislando eksplikas la naskiĝon kaj evoluon de Esperanto kaj ĝian rolon en solvo de internaciaj lingvaj problemoj kaj estas internacie fama verko pri esperantologio. Nun tiun ĉi libron elesperantigis kamarado Honfan, kiu okupiĝis pri Esperanto kaj ĝia studado dum multaj jaroj. Ĝi sendube estos grava referenca libro por la ĉinaj Esperanto-laborantoj kaj ankaŭ helpas la senĉesan disvolviĝon de la E-movado en Ĉinio." La tradukinto detale rakontis en la antaŭparolo la naskiĝon de la idealo pri internacia lingvo kaj la historion

de Esperanto kaj donis trafan komenton pri la vivo de Edmond Privat kaj lia eminenta kontribuo al la E-movado.

LA 52-A INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj (IABE) estas organizanta la 52-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj kadre de festivalo de itala kulturo, de la 21-a ĝis la 30-a de junio 1984 en Tirrenia (Pisa). La temo de la kongreso estas "La blinda virino en la nuntempa socio". Korespondantojn oni sendu (brajle) al: Daniela Botegoni, via Rismondo I, 160123 ANCONA (Italio).

LA 21-A POLA ESP-KONGRESO

La 21-a Pola Esperanto-Kongreso okazis en Lodzo de la 21-a

ĝis la 23-a de oktobro 1983. En ĝi partoprenis ĉ. 600 esp-istoj inkluzive de reprezentantoj el 14 eŭropaj landoj. La kongreso estis organizita en la 75-a jubileo de lodza esperantista organizaĵo.

SPECIALA NUMERO POR ESPERANTO EN JAPANIO

La oktobra numero de 1983 de japana ampleksa lingvistika revuo "Lingvo" eldoniĝis kiel speciala numero por Esperanto. En ĝi aperis 20 riĉenhavaj artikoloj pri Esperanto, la vivo de Zamenhof, kontribuo de Esperanto al lingvistiko, Esperanto en japanaj lernejoj, Esperantaj organizoj internaciaj kaj enlandaj k.a. Per tiu speciala numero por Esperanto, multaj personoj en japana lingvistika rondo nun bone konatiĝis kun Esperanto.

LA 68-A BRITA KONGRESO

LKK de la 68-a Brita Kongreso invitas eksterlandajn esperantistojn al Weston-super-Mare dum la kongreso, kiu okazos de la 25-a ĝis la 28-a de majo 1984. Tiuj, kiuj akceptas la inviton, povas ĉeesti la kongreson senpage de la kotizo.

KVINDEK JAROJN DE ESPERANTO

Veteana esperantisto Frank Buckley, angla advokato, jubileas

La Lodza Koruso "Eĥo" kantas dum la "Trarigardo de Esperanta Artmovado — OPERA 1983".





S-ano Frank Buckley

sian sepdekan jarfeston per rondvojaĝo al grupoj kaj kunvenoj multlandaj donante sian lumbildan kaj magnetfonan prezentadon "Kvindek jarojn de Esperanto". Grupoj kaj societoj kiuj deziras viziton de Frank Buckley dum 1984 povas skribi al li: 620 Filton Avenue, Bristol. BS12 7LD. Britujo.

STUDTAGO PRI ESPERANTO

Por atentigi la universitatan neesperantistan publikon pri manko de oficiala Esperanto-kurso en universitato, estis organizita "Studtago pri Esperanto" en la

universitato de Paris VIII-Vincennes en Saint-Denis, la 25-an de novembro, sub la kunlaboro de Esp-sekcioj de la universitatoj de Provence Aix-Marseille I, Clermont-Ferrand III kaj Haute-Bretagne Rennes II kaj la aŭspicioj de la lingvaj kaj lingvistikaj fakoj.



(daŭrigo de p. 13)

artikolo. Kompreneble la artikolo multe interesis nin. Ĝeneral-dire, esperantistoj estas plej sentemaj kaj malplej konservativaj en la lingva problemo, kaj ili povas rigardi la problemon el vidpunkto de disvolviĝo. Ĉiaokaze ni devis solvi tiun enigmon.

Tiam mi, kiel redaktoro de "La Mondo", organo de la Ŝanhaja Esperantista Ligo, redaktis ĝian naŭan numeron de 1933. Mi do aperigis en tiu numero anoncon, petante, ke sovetuniaj esperantistoj sendu al ni koncernajn materialojn pri la nova ĉina skribo, eldonitajn en Sovetunio. Ni publikigis la anoncon ankaŭ en la 10-a kaj 11-a numeroj. "La Mondo" havis interŝanĝan rilaton kun E-organizoj de Sovetunio. Ni kredis, ke sovetuniaj esperantistoj certe ĝin legos.

Kiel atendite, en la fino de la jaro ni ricevis materialojn el Sovetunio. V. P. Isajev, lingvistika profesoro de Ukrainio, sendis al ni sian disertaĵon en Esperanto "Latinigo de la Skribo de Diversaj Naciecoj de Sovetunio kaj Latinigo de la Ĉina Skriba Lingvo". Ni ĉinigis kaj aperigis

ĝin en "La Mondo". Poste ni ricevis de Sovetunio dokumentojn, projektojn, ortografiajn regulojn, lernolibrojn, vortarojn, legaĵojn, literaturajn verkojn koncernantajn novan skribon, kaj ankaŭ "Yngxu Sin Wenz Liurh Bao", presitan en nova skribo. La materialoj estis senditaj ĉefe de du esperantistoj de Ukrainio, V. Kolĉinski, membro de la Lingva Komitato de la Sovet-Respublikara Esperantista Unio kaj redaktoro de "Plena Rusa-Esperanta Vortaro" kaj V. P. Isajev, kiun mi menciis supre.

La ĉinaj esperantistoj komencis publikigi artikolojn en gazetoj kaj ĵurnaloj por konigi la novan skribon. Tio tuj trovis fortan subtenadon ĉe Lusin, granda ĉina moderna pensulo kaj literaturisto. Li skribis multajn artikolojn por energie propagandi tiun projekton. Li eldonis broŝuron, en kiu li kunmetis ĉiujn siajn artikolojn pri reformado de la ĉina skriba lingvo kaj pri ĝia nova skribo. Li donacis al ni sian tutan honorarion por la broŝuro kiel monrimedojn por presi eldonaĵojn en la nova skribo.

Tiam parto de la membroj de

la Ŝanhaja Esperantista Ligo, krom sin okupi pri Esperanto, komencis propagandi kaj disvastigi la movadon de nova latina skribo. En la tuta lando, ĉie, kie troviĝis la Esperanta movado, leviĝis la propagando de nova latina skribo, intime ligita kun la nacisava movado, tiel ke la propagando disvolviĝis tra la lando kaj fariĝis amasa movado plej grandskala en la historio de Ĉinio. Ĝi estis la avangardo de la reformado de la ĉina skriba lingvo post la Liberiĝo.

La projekto por la ĉinlingva fonetika alfabeto kreita de ĉinoj eksterlande koniĝis en Ĉinio pere de Esperanto, formis grandan movadon kaj donis grandan influon, kio estis epizodo tre interesa por la ĉina Esperanta movado.

La afero ankaŭ renomigis Esperanton en Ĉinio. El tio oni vidas, ke Esperanto estas ilo tre utila kaj iam eĉ ludis gravan rolon en neatendita sfero.

* La aŭtoro estas fama ĉina veterana esperantisto, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj vicedestro de la Komitato por Reformado de la Ĉina Skriba Lingvo.

HONESTECO

de LAŬF

LA gepatroj de Minmin ĉiutage iras labori en fabriko. Foje li revenis hejmen antaŭvespere post lecionoj kaj, malferminte la pordon, trovis flor-vazon rompita sur la planko. Ja antaŭ nelonge panjo portis hejmen la vazon. Ĉu ĝi ne bone staris sur la ŝranko, kiam Minmin forlasis la hejmon tagmeze? Kio do okazis poste? Li komencis balai la rompaĵojn, sed la konfuzon en sia koro li ne povis forbalai.

La pordo denove malfermiĝis kaj la patrino eniris. Vidinte la rompaĵojn, ŝi senpacience demandis: "Minĉjo, ĉu vi . . .?"

"Ne, ne mi . . . Mi trovis ĝin jam rompita ĉe mia reveno." respondis Minmin.

La patrino kuntiris la brovojn. "Via paĉjo ja estas en la fabriko, do kiu alia povus rompi la vazon, se ne vi. . .?" ŝi diris.

"Tamen ne mi," li insistis.

Meditinte, la patrino daŭrigis: "Bona infano devas esti honesta. Se vi kuraĝos konfesi vian kulpon, mi aĉetos por vi belan pied-pilkon en la venonta dimanĉo."

"Ne, mi ne kulpis, ne mi. . ." Panjo suspiris kaj pacience di-

ris: "Ĉu vi ne promesis al mi kaj via paĉjo, ke vi volas esti honesta infano? Kial vi ne konfesas la veron?"

Minmin laŭte respondis: "Tamen, efektive, ne mi rompis la vazon."

La patrino ekkoleris kaj etendis la manon por bati tiun obstinan etulon. Paŭtante, Minmin diris: "Mi ne devus mensogi, eĉ se vi batus min."

Ĝuste en tiu momento revenis la patro, tion vidinte, li haste ekkriis: "Haltu, haltu! Ne Minĉjo rompis la flor-vazon."

La patrino ĵetis koleran rigardon al la patro kaj diris: "Ne kaŝu lian eraron! Ni ne devas malbonigi la infanon per dorlotado. . ."

"Sed permesu al mi klarigi la aferon," ŝin interrompis la patro. "Posttagmeze mi revenis hejmen por preni urĝe bezonatan libron el la ŝranko kaj en hastado faligis la vazon. Mi eĉ ne havis tempon por forigi la rompaĵojn. . ."

La patrino ekhontis kaj, tirinte Minĉjon al sia sino, sin kulpigis: "Mi eraris. . ."

Minmin diris: "Nia instruistino diris al ni, ke honesta infano neniam mensogas. Li devas havi la kuraĝon konfesi sian eraron, kiam li eraras; sed, kompreneble, li ne devas sin kulpigi, kiam li ne eraras. Panjo, ankaŭ mi devas esti tia infano, ĉu ne?"



Mi kaj mia peranta laboro

de KENNETH G. LINTON (Aŭstralio)

Mi esperantistiĝis en majo de 1931, gajnis la elementan diplomon en novembro de la sama jaro kaj mezan diplomon kun honoro en 1932, sed la terciaran diplomon en 1961.

De 1952 ĝis 1974 mi trifoje elektiĝis kiel prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, kaj funkciis kiel kasisto de AEA kaj membro de la Ekzamena Komisiono de AEA. Dume mi estis delegito, ĉefdelegito kaj komitatano de UEA.

Mi verkis la romanon pri Novgvineo "Kanakano el Kananam" en 1961 kaj kompilis la

Lernolibron por Kandidatoj por la Meza Ekzameno en 1976 kaj la Lernolibron por Kandidatoj por la Elementa Ekzameno en 1977.

Mi vizitis aŭ restadis en multaj landoj kiaj Novzelando, Usono, Kanado, Tajlando, Nepalo, Indonezio, Singapuro, Hindio, Grekio, Italio, Aŭstrio, Svislando, FR Germanio, Luksemburgo, Francio kaj Britio. Mi havis ŝancon vaste kontakti tieajn esperantistojn kaj raporti Esperanton.

Ĉiujare, en la unua semajno de novembro mi elsendas prezlis-

tojn kun ĉiuj kategorioj de membreco de UEA, kaj ĉiuj ĉefaj gazetoj en la esperanta mondo, inklude, kompreneble, de El Popola Ĉinio, enmetante iajn flugfoliojn, kiujn mi jam ricevis antaŭ novembro, sendante al ĉiu aŭstralia esperantisto, kies nomon kaj adreson mi havas. Tiuj membroj sendas al mi elektitan liston de siaj bezonaĵoj kune kun la pago. Se iuj ne pagis je la fino de januaro, mi sendas memorigilon. Mi ne peras ĉinajn librojn, ĉar tion faras la Libroservo de AEA. Sed kiel peranto, mi ĉiam serĉas novajn ideojn por bone fari tiun laboron.

Pri mia laboro por EPĈ

de A. Ribot (Francio)

S-ro A. Ribot



Laŭ via scio, mi peras la ĉinajn librojn de vi eldonitajn, same kiel la belan revuon EPĈ. Ĉar mi posedas Esperanto-eldonejon de pli ol 20 jaroj, ĉiufoje kiam mi sendas pakaĵon da libroj, mi enmetas etan katalogon pri la ĉinaj eldonaĵoj. La aĉetantoj sendas al mi sian mendon kaj mi tuj plusendas ĝin al vi. Mi konservas por mi nenian makleron nek procentaĵon.

Mi estas esperantisto ekde 1940, faris 1 250 prelegojn pri Esperanto en la francaj ŝtatlernejoj kaj fondis mian eldonejon en 1959 precipe por reeldoni la ver-

kojn de D-ro Zamenhof — Fundamento de Esperanto, Lingvaj Respondoj, Hamleto kaj Marta. Ankaŭ diskokurson (aŭ kaset-) mi eldonis, adaptitan por la franca- kaj angleparolantoj.

Mia tuta nomo estas Andre Ribot; mia adreso 111 rue Vergne 47200 — MARMANDE; mia telefono (53) 64.27.30. De 1954 ĝis 1962, mi estis ĝenerala sekretario de nia nacia asocio. Bedaŭrinde, la malbona stato de miaj okuloj ne permesas al mi legi aŭ skribi multe . . . Sed tio estas tute alia afero . . .

MUZEO DE VULKANOJ

de **SHI MO**

EN la norda parto de Dedu-gubernio, Heilongjiang-provinco de la nordorienta Ĉinio troviĝas bela mondo de vulkanoj, konsistanta el 14 konusformaj vulkanoj kaj kvin verdaj lagoj interligitaj. Sur la montaro ĉirkaŭita de akvoj ĉie videblas groteskaj rokoj. Tio estas fama vidindejo de estingitaj vulkanoj nomata Kvin Interligitaj Lagoj.

Tie estas kaj fru-perioda vulkano erupciinta antaŭ pli ol 600 000 jaroj kaj mezperioda vulkano erupciinta antaŭ pli ol 300 000 jaroj kaj ankaŭ proksimperioda vulkano erupciinta inter 1719-1721, kiuj prezentas ĉiajn trajtojn de vulkanoj novaj kaj malnovaj, sekve oni nomas tiun lokon "Muzeo de Vulkanoj".

La Nigra Monto estas proksimperioda vulkano. Forlasinte la sanatorion, mi vidis tra aŭta fenestro, ke ĉie estas nigraj lafoj en groteskaj formoj, iuj similas al kuranta tajdo kaj aliaj al interkruciĝintaj arboradikoj. Rigardante supren de la montpiedo, oni vidas, ke ĉie estas nigraj cindroj.

La norda montodeklivo estas kovrita de densaj arbaroj el koreaj pinoj, larikoj, piceoj, betuloj kaj arbustoj. Ni surgrimpis la montsupron laŭ vojeto kaj vidis antaŭ niaj okuloj krateron funelforman kaj 150 metrojn profundan kun diametro de 340 metroj.

La kratero impresas timige malhele kaj mistere kaj vekas ĉe la vizitantoj strangan senton je imago pri la impona aspekto ĉe ĝia erupcio.

Nordoriente, proksime de la monto staras alia nigra vulkano duigita kvazaŭ de akra hakilo. Ĝi erupciis samtempe kun la Nigra Monto kaj nun ree aspektas kvazaŭ bruligita. La vojgvidisto diris al mi, ke la duiĝo okazis ĝuste ĉe la potenca erupcio, kaj en kampoj je kelkaj kilometroj ĉirkaŭe hodiaŭ videblas gigantaj rokoj disĵetitaj dum la erupcio.

La du supre menciitaj vulkanoj erupciis antaŭ 260 jaroj, kion notis la loka kroniko. Tio estis la lasta erupcio de vulkanoj relative grandskala en la historio de Ĉinio. La elsputitaj lafoj transformis Bailong-riveron tie fluantan en la Kvin Interligitajn Lagojn.

Ĉirkaŭrigardante de la supro de la Nigra Monto, oni vidas deklake da vulkanoj fruaj kaj mezperiodaj. Iuj el ili staras solece, aliaj pare unu kontraŭ la alia, ĉiu kun malsama aspekto. Ĉiuj estas kovritaj de densaj arbaroj, inter kiuj brilas la Kvin Interligitaj Lagoj kiel smeraldoj inkrustitaj.

La sekvantan tagon mi venis al la lagoj por ĝui la pejzaĝon en boato. Sub la serena ĉielo ondantas la verdaj lagoj. En la akvo klare speguliĝas la Lagmeza

Pavilono. Oni diris al mi, ke la totala areo de la kvin Interligitaj lagoj kovras kelkdek kvadratajn kilometrojn kun maksimuma profundeco de pli ol 20 metroj. Nun tie funkcias bredejo de pli ol 30 specoj de fiŝoj, inter kiuj la delikat-vianda kaj bongusta karaso estas tre ŝatata de la konsumantoj.

Okcidente de la sanatorioj staras monto kun ebena supro. Ĉe ĝia montpiedo estas multaj kurac-fontoj admirataj de tieaj loĝantoj. La Kurac-fonta Monto estas la plej malgranda kaj malalta inter la vulkanoj, tamen tie troviĝas la plej granda malvarmfonto kun karbolo kaj fero.

Pri la kurac-fontoj cirkulas bela legendo: Antaŭ pli ol cent jaroj ĉe la Kvin Interligitaj Lagoj prosperis praarbaroj kaj vivis herdoj de cervoj. Iutage, persekutante vunditan cervon, iu dahura ĉasisto atingis la monton, kie rivero el fontakvo baris al li la vojon. La cervo travadis la riveron, ĝia vundo resaniĝis kaj ĝi sagrapide forfuĝis. Mirigite de tio, la ĉasisto atente rigardis la klaran akvon kun ŝaŭmoj. Li trinkis iom, sentis sin refreŝigita kaj ekhavis bonegan apetiton. Disvastiĝis la famo kaj la proksimaj loĝantoj kolektiĝis tie je la Drak-boata Festo (la 5-an de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro) ĉiujare, trinkas la sanktan akvon, kaj sin banas per ĝi por kuraci malsanojn.

En la longa uzado oni iom post iom ekkonis la apartajn kuracefikojn de la fontoj en tiu loko. La Suda Fonto estas efika por kuraci nervajn malsanojn, la Norda Fonto por kuraci malsanojn de la digesta sistemo kaj la Ŝaŭma Fonto por kuraci dermatozojn.

Frumatene, kiam ĉe la firmamento ankoraŭ trembrilis Venuso, jam videblas vizitantoj ĉe la kuracaj fontoj, kie nun elegantaj ĉin-stilaj klasikaj pavilonoj disponeblas por ripozo.

Mi trinkis glason da malvarmeta fontakvo, baldaŭ ruktis kelkfoje kaj sentis min refreŝigita.

Sidis apud mi kalva junulo kun plaĉaj trajtoj. Nur post interparolo mi eksciis ke "li" estas 20-jara knabino. Eble pro neŭrasteno ŝi perdis la hararon antaŭ nelonge. Ŝi ricevis kuracadon de pluraj hospitaloj, sed ŝia


sanstato ne pliboniĝis. Post dekkelktaga baniĝo kaj priŝmiro de la kapo per la minerala ŝlimo, rimarkinde pliboniĝis ŝia sanstato. Mi rimarkis ke sur ŝia kapo jam elkreskis nigraj haroj mallongaj.

Survoje mi interparolis kun iu pli-ol-50-jara paciento el la karbomineja sanatorio. Tiu tutkorpe reŭmatisma paralizito jam povas mem piediri nur post pli-ol-monata kuracado. Vera miraklo! Mia vojevuidisto diris al mi, ke similaj mirakloj ja ne mankas tie.

La Provinca Instituto de Mineralfonta Terapio asertas, ke la tiea minerala akvo estas tre efika por kuraci la stomakan kaj duodenan ulceron kaj kronikan gastriton. En la pasintaj jaroj 1 500 personoj suferantaj tiajn malsanojn estis kuracitaj tie. El ili 38% estis tute resanigitaj, 43% el ili montris rimarkindan efikon kaj 11% el ili pruvis certan efikon.

Nun tie funkcias fabriko de minerala akvo, kies produktaĵoj estas vendataj en- kaj eksterlande.

En la pasintaj jaroj tie leviĝis kelkdek sanatorioj. La modernaj domaroj majeste elrigardas inter ombroriĉaj arboj. Laŭ statistiko sole en 1982 tiun lokon vizitis turistoj kaj malsanuloj je 300 000 homfojoj. La respondeculo de la urbeto Kvin Interligitaj Lagoj diris al mi, ke oni nun ellaboras novan planon por funkciigi pli da servoj kaj akcepti pli da klientoj kaj turistoj.



Tarifo: 1 internacia respondokupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Deziras korespondi kun esperantistoj-aktivuloj de la Ruĝa

Kruco, pri realeca prezentado de la lezoj, hejma flegado de malsanuloj kaj flegado de patrinoj kaj infanoj. Adreso: Juliya Beltram, Admirala Geprata 8/II,III ulaz, 11000 Beograd, Jugoslavio.

* Ni bonvenigas korespond-proponojn el aliaj landoj. Ni estas ĉilaj geesp-istoj de la urbo Valdivia, kiuj ĵus fondis E-grupon ĉi tie. Ni ankaŭ dankegus pro donacoj por nia formota biblioteko. Skribu al ni, indikante vian nomon, sekson, aĝon, interesojn, ktp. Valdivia Esp-Societo, p/a Villa Magisterio 032, Valdivia, Ĉilio.

* Biblioteka E-grupo/ Miŝkolc-23, Pf-101, H-3523, Hungario/ volas

bindigi por la plej granda urba biblioteko la unuajn 20 jarkolektojn de El Popola Ĉinio, sed ĉefe el la 1-150 numeroj mankas ankoraŭ kelk-dekoj. Ni petas ĉiujn helpi nin tiurilate. Kiuj povas sendi entute 18 malnovajn n-rojn de EPC, por tiuj ni povos certigi 6 numerojn de Hungara Vivo el 1984, se ni ricevos latinliteran adreson.

* Sperte juna Esperantisto deziras korespondi: Alexander Mikiŝev, P.K. 184, SU-614056 Perm USSR.

* 16-j. Ilirjana Skenderi, Rr-Rifat Vidishigi 120, 38220 Mitrovice e Jitos, Kosove, Jugoslavio, dez. kor. tutmonde.

Wudalian-lago


Fotoj de YAN JIN

Sanatorio



Kratero






Groteskaj lafoj

Arbaro ĉe kratero





Remado sur la lago



Groteskaj lafoj

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Ministro de la nuna franca registaro kaj estro de la urbo PAŬO (Francio) s-ro André Labarrere donas sian plenan aprobon al Esperanto. Li subskribis la oran libron: "Estas agrable al mi okaze de la inaŭguro de la Skvaro Zamenhof subskribi tiun oran libron kaj rediri mian plenan aprobon al esperantista movado kaj al ties paŭaj gvidantoj."

Aŭtunas sur la Skvaro Zamenhof en Paŭo, Francio.



S-ro urbestro surskribas la oran libron.
Foto de BERNARD MACAIGNE (Francio)

Foto de MARIE-THERESE LLOANCY (Francio)



XU HUADANG:

BAMBUA AGLO MIRIGIS USONANOJN

—Pri artaj bambuplektaĵoj de Shengxian-gubernio

EN la “Monda Foiro 1982” okazinta en Knoxville de Tenesio en Usono, estis eksponata batalema kaj akraokula bambua aglo kun flugiloj etenditaj je 115 cm. Multaj vizitantoj haltis antaŭ ĝi kaj ekkriis “ho!”

“Ĉu ĝi estas plektaĵo el bambuo?” mire demandis iuj rigardantoj.

Jes, ĝi estis majstraĵo de metiistoj de la Shengxian-a Fabriko de Artaj Bambuplektaĵoj ĉe la piedo de Siming-monto en orien-

ta Zhejiang-provinco, Ĉinio. En la gubernio zigzage fluas Shanxi-rivero, mildas la klimato kaj verdas la monto. Ambaŭborde de la rivero ĉie kreskas bambuaroj. Antaŭ pli ol 2 000 jaroj la lokanoj jam komencis plekti el bambuo simplajn korbojn kaj uzi ilin en ĉiutaga vivo.

Bambuplektistino



Tiu fabriko estis konstruita en 1950. Kaj nun ĝi jam havas areon de 10 000 m² kaj pli ol 80 prilaborajn punktojn sub produktaj brigadoj. Oni prenas rektajn kaj flekseblajn bambuojn kiel krudmaterialon, kaj fendas ilin en fadenojn aŭ pecojn kun la dikeco de haro. La projektistoj kaj metiistoj heredis kaj kreis centon da plektaj manieroj, kio renovigis la antikvan plekt-arton.

Bestformaj bambuplektaĵoj estas projektitaj ĉefe de Yu Zhanggen, la direktoro de la esplora sekcio de tiu ĉi fabriko. Inspirite de tio, ke eksterlandaj klientoj konkure aĉetas bestformajn porcelanaĵojn, en 1966 majstro Yu komencis esplori tiajn bambuplektaĵojn. La bambuplektaĵoj havas diversajn ĉarmajn formojn de bestoj flugantaj, irantaj, sidantaj, kuŝantaj kaj sinĝetantaj.

Kiam vi rigardas la eksponejon de la fabriko, vi kvazaŭ estas en bestara mondo, kie troviĝas ŝvebantaj agloj, persekutantaj tigroj, pavantaj pavoj, stultetaj pandoj, kaj ankaŭ ranoj, lokustoj, pigoj, papilioj. . . El ili anseroforma korbo estas originala: la ansero, kun kapo iom klinita, kombas sian plumaron per la beko, la flugiloj leviĝantaj servas kiel tenilo kaj la piedoj kiel subteniloj de la korbo, la korpo de la ansero estas uzata kiel ujo. La tuta kompleto konsistas el kvin korboj, kiujn oni povas meti unu en alian, tiel ke ili estas facile porteblaj por unu persono.

La bestformaj bambuplektaĵoj malfermis al si novan merkaton. Kaj pro tio Yu Zhanggen estas honorita de la Malpez-industria Ministerio de Ĉinio per la titolo "majstra metiartisto".

Lakaĵo kun bambuplektaĵo kiel skeleto estas produktaĵo de

antikva tradicia arto de Shengxian-gubernio. Post speciala prilaborado la produktaĵo fariĝis brila kaj pli fortika ol porcelanaĵo kaj ankaŭ rezistema kontraŭ bolanta akvo. Nun oni jam povas produkti diversajn tiuspecajn lakaĵojn, kiaj mebloj, fruktoskatoloj, pladoj kaj florzavoj.

La tradiciaj bambuplektaĵoj ŝatataj de popolamasoj, kiel "Feino Magu Donacas Longvivajn Persikojn", "Drakŝipo", "Du Drakoj Ludas kun Globo", "Yue Fei" kaj "Naŭ Leonoj", radias je novaj briloj. La metiistoj kreis ĉarmajn figurojn de historiaj personoj per diversaj plektataj metodoj. En la grandtipa plektaĵo "Yue Fei" oni modlis la nacian heroon de la Suda Song-dinastio, kiu rajdas sur henanta ruĝa ĉevalo kaj estas preta elingigi la glavon. La verko prezentas la heroan, patriotisman spiriton de Yue Fei. Ĝi estas plektita per tre maldikaj bambufadenoj. 150 tiaj fadenoj vicigitaj havas


dikecon de nur 3.3 cm. La vivaĵo de Yue Fei estas plektita vivece kaj delikate, eĉ liaj buŝanguloj, nazopinto, okulkadroj kaj oreloj klare sin konturas.

Ankaŭ troviĝas aliaj majstraj verkoj, kiel "La Pagodo Liuhe", "Drakŝipo" kaj "Kiosko de Peonio" projektita laŭ la samtitola ĉina klasika verko. "Feino Magu Donacas Longvivajn Persikojn" projektita kaj plektita de Yu Zhanggen kaj aliaj metiistoj figuris feinon, kiu tenas feajn persikojn kaj vinon sur siaj manoj kaj flugas kune kun fea gruo al la ĉielo. Ĝiaj delikataj haŭto kaj haroj kaj en vento flirtantaj jupo kaj rubando estas versimilaj.

La metiistoj en Shengxian-gubernio donas grandan atenton al kvalito de la produktaĵoj. Por preventi ŝimadon kaj atakon de insektoj al la produktaĵoj, oni fondis specialan grupon por esplori kontraŭrimedon, kaj aplikas la eltrovitajn metodojn en produktado. Dank' al tio altiĝis la valoro de bambuplektaĵoj en uzado kaj aprezado. La nunaj bambuproduktaĵoj de Shengxian-gubernio povas esti konservataj kompare pli longe, sen difektiĝo de ŝimado kaj insektoj.

En 1982 la bambuplektaĵoj de Shengxian-gubernio gajnis premion "Cent Floroj", oran pokalon, en la dua premiojuĝa kunveno de la ĉinaj metiartaĵoj. Nun la fabriko produktas 4 000 specojn de diversaj produktaĵoj kiel korbo, vazo, plado, skatolo, ekranego, besto, homfiguro, meblo, lampo kaj ludilo. La produktaĵoj estas vendataj en Usono, Japanio, Italio, FR Germanio, Singapuro, Hongkongo kaj aliaj pli ol 50 landoj kaj regionoj.

Bambuplektitaj vazoj



Sciencistoj en sovagejo

EL la ĉina vasta teritorio de 9 600 000 kvadrataj kilometroj, 60% estas foraj kaj nacimalplimultaj regionoj. Tiuj lokoj havas abundon da herbejoj, arbaroj, diversaj ekonomiaj plantaĵoj kaj mineraloj. Dum longa periodo la scienco, kulturo kaj ekonomio de tiuj lokoj estas multe pli estiĝintaj ol tiuj en marbordaj kaj landinternaj regionoj pro la historiaj kaŭzoj, malbonaj naturaj kondiĉoj kaj malfacilega trafikado.

Ĝuste pro tio tie estas urĝe bezonata granda nombro da kleruloj, sciencistoj kaj teknikistoj ne timantaj malfacilan vivon kaj havantaj grandan ambicion. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, aro kaj aro da sciencistoj kaj teknikistoj, altlernejaj diplomitoj kaj specialistoj iris al la Nordoriento, Nordokcidento kaj Sudokcidento de Ĉinio, responde al la alvoko de la ŝtato "Iru al landlimaj regionoj, al malfacilaj lokoj kaj al lokoj, kie ilin plej bezonas la patrolando". Laŭ statistiko, nun en tiuj regionoj

pli ol 500 000 sciencistoj kaj teknikistoj laboras kune kun tieaj diversnaciaj popolanoj, farante kontribuon al la disvolviĝo de la tieaj ekonomio, scienco kaj kulturo.

En julio, 1985, okazis en Pekino kunsido de avangardaj sciencistoj kaj teknikistoj laborantaj en la nacimalplimultaj regionoj de Ĉinio. La kunveno premiis kaj honoris pli ol 2 000 el ili kaj donis honoran diplomon al 320 000 sciencistoj kaj teknikistoj, kiuj persiste laboris pli ol 20 jarojn en nacimalplimultaj kaj malproksimaj regionoj.

Konforme al la bezono de la lokaj popolanoj en produktado kaj vivo, la sciencistoj kaj teknikistoj en nacimalplimultaj regionoj aplikis kaj disvastigis novajn teknikojn konvenajn al la kondiĉoj de la loko kaj multe altigis la ekonomiajn efikojn de tieaj industrio, agrikulturo, brutobredado kaj forstumado.

Menyuan-gubernio de Qinghai-provinco iam kulturis pli ol

5 000 hektarojn da kolzo, kaj la hektara produktokvanto vagis inter 400 kaj 500 kilogramoj pro manko de bonspeciaj semoj. Dank' al pli-ol-dekjara klopodado, timante nek bruligan sunradion nek ventegon kaj pluvegon, agronomo Shao Defu elkulturis bonan specion de kolzo frostorezistan kaj la hektara produktokvanto atingis 1 tunon, kaj en la pasinta jaro eĉ atingis 3 150 kilogramojn. La sukceso de la bonspecia kolzo estis premiita de la ŝtato. Nun en la provincoj Liaoning, Heilongjiang kaj Shaanxi kaj la regiono Xinjiang troviĝas pli ol 130 000 hektaroj da kolzo de tiu bonspecio.

Antaŭ dek jaroj Tu Minyi, Ŝanhaja knabino kaj ŝia edzo venis al la paŝtejo Nanshan de Hunan-provinco. Sub penigaj vivkondiĉoj ŝi faris esploradon pri gresoj kaj sciencan eksperimentadon kaj akumulis riĉan sperton. Ŝi prenis sur sin la taskon enkonduki specon de greso en Nanshan. Kunlaborante kun la laborantoj de la paŝtejo kaj

sciencistoj el Aŭstralio, ŝi sukcese herbizis 3 300 hektarojn ĝis la fino de 1982 kaj evitis morton de brutoj pro manko de greso. Ŝia sukceso estis multe laŭdata de specialistoj en- kaj eksterlandaj.

Jin Che, helpanto-esploristo de la Mudanjiang-a Agronomia Esplora Instituto en Heilongjiang-provinco, kiu laboris en nacimalplimultaj regionoj 24 jarojn, plivastigis 19 avangardajn teknikojn pri kulturado de rizo sur 200 000 hektaroj da kampoj, kaj grena produktokvanto plimultiĝis je 200 000 tunoj. Krom tio li gvidis pli ol 70 diverstipajn kursojn de rizkultura tekniko por kore-naciecaj kamparanoj. Post trejnado ili kultivis per novaj teknikoj, kaj rezulte de tio multe ŝanĝiĝis iliaj vilaĝoj.

Mankas al nacimalplimultaj regionoj medicinaj servoj kaj medikamentoj, tial la popoloj longtempe suferis de iuj endemioj. Por ŝanĝi tiun staton, granda nombro da medicinaj laborantoj en tiuj lokoj fervore servas al la popolo kaj persistas en preventado kaj kuracado de malsanoj, timante neniam malfacilojn kaj danĝerojn, tiel ke la endemioj en multaj lokoj estis likviditaj por ĉiam. Luo Ming-guang, estro de hospitalo en Longli-gubernio, Guizhou-provinco, tutan jaron klopodas por doni kuracon al mjaŭ-aj popoloj en montaro. Tie la kondiĉoj estas malbonaj kaj iam li eĉ devas fari operaciojn sub oleolampo. Dum la lastaj 20 jaroj li eldanĝerigis pli ol 2 000 malsanulojn. Liu Qilin, kuracisto de

haŭtmalsana kuracejo en Ma-shan-gubernio de Guangxi, okupiĝis pri preventado kaj kuracado de lepro jam 26 jarojn. Timante nek malpuraĵon nek lacegon kaj spitante infektadon de lepro, li kontaktiĝis kun lepruloj kaj zorgeme kuracis ilin. El la 56 lepruloj, al kiuj li donis kuracon kune kun siaj kolegoj, krom unu mortinta pro alia malsano, ĉiuj aliaj 55 elhospitaliĝis kaj ĝis nun neniam remalsaniĝis. Dank' al ilia klopodado lepro jam estis efike bridita en tiu regiono.

Multe da sciencistoj kaj teknikistoj laborantaj en malproksimaj kaj nacimalplimultaj regionoj senĉese faras novan esplorado. Liang Xu, fama ĝuang-a genetikisto kaj profesoro de la Guangxi-a Medicina Instituto, estas unu el ili. Multaj nacimalplimultaj regionoj de Guangxi preskaŭ havis nenian rilaton kun la ekstera mondo pro la influado de la malnovaj moroj kaj kutimoj kaj la subpremado fare de la regantaj klasoj de la diversaj dinastioj, tial geedziĝo inter proksimaj parencoj estis tre ĝenerala. Ĉe hospitala kliniko plialtiĝas morbokvanto de heredaj malsanoj, inter kiuj plimultiĝas hemoglobina malsano. Ekde la lastaj kvardekaj jaroj, post kiam sciencistoj trovis la eksterordinaran hemoglobinan malsanon, rapide disvolviĝis esplorado pri tio internacie. Por senigi nacimalplimultojn je tiu malsano, profesoro Liang Xu sin okupis pri la esplorado de hemoglobino kun granda entuziasmo. En la lastaj jaroj ili faris

ĝeneralan analizon al 600 000 homoj de 37 naciecoj kaj havis unuapaŝan konon pri morbokvanto de hemoglobina malsano kaj la proporcioj de kazoj en diversaj naciecoj de Ĉinio. Samtempe ili sukcese plenumis la esplorado de pli ol 30 hemoglobinoj de eksterordinaraj molekulo-strukturoj, tiel inter la pli ol 300 eksterordinaraj hemoglobinoj publikigitaj internacie troviĝis ankaŭ fruktoj de Ĉinio. Yang Haoran, inĝeniero de Radia Fabriko de la Tuĝia-a kaj Mjaŭ-a Aŭtonoma Subprovinco en la okcidenta Hunan, malsaniĝis je kancero, sed li batalis kontraŭ la malsano per granda energio kaj optimismo kaj kune kun siaj kolegoj elfaris novajn radioinstrumentojn, kiuj ricevis duagradan premion de la provinco kaj duagradan premion de la Ministerio de Mekanika Industrio. Ĝuste kun tiuj ĉion-spitaj spiritoj la vastaj amasoj de sciencistoj kaj teknikistoj antaŭenmarŝas per siaj kreivaj laboroj.


Inter la 279 ĉefaj konstruoj de la 6-a Kvinjara Plano nun plenumata en Ĉinio, 60% de ili estas en malproksimaj kaj nacimalplimultaj regionoj. En la fino de la kuranta jarcento kaj la komenco de la venonta jarcento, la centro de la ĉina ekonomio transiĝos al la Nordokcidento, kio certe altiros tien pli multajn sciencistojn kaj teknikistojn kaj altlernejajn diplomitojn kun idealo kaj granda ambicio por disvolvi ilian saĝon kaj fari pli grandan kontribuon al disvolvo de la tieaj ekonomio, scienco kaj kulturo.

Poŝto — ponto inter ĉiuj landoj

Jena letero gajnis oran medalon en la Internacia Konkurso pri Leterskribado por Geknaboj de la jaro 1983. La aŭtoro estas 14-jara lernanto de la Pekina Fuchenglu-a Mezlernejo.

La konkurso iniciatita de la Universala Poŝta Unio ekde 1972 okazas ĉiujare. Ĝi celas kulturi intereson de infanoj pri leterskribado, ekspluati ilian saĝon, plibonigi ilian verkan stilon, kaj samtempe fari kontribuon por plifortigi la amikecon inter diverslandaj infanoj kaj komprenigi al ili poŝtan funkcion. En 1983 geknaboj el 37 landoj partoprenis en la konkurso kun la temo "Poŝto — ponto inter ĉiuj landoj". Ĉinaj geknaboj la trian fojon partoprenis en ĉi aktivado kaj gajnis la duan oran medalon ekde 1981.

La Red.



La aŭtoro

La 20-an de marto, 1983

Karaj eskimaj amiketoj,

Saluton! La letero adresita al la amiketoj, kiuj amas la poŝton, estas ricevita de mi, ĉina knabo, kun flava haŭto kaj nigra hararo. Kiam mi vidis la vortojn sur la koverto "El la Norda Poluso", mi miris en mi: "Kiu el la glacia kaj neĝa Norda Poluso skribis al

mi?" Sed post legado, mi eksciis, ke ĝi estas adresita de vi, eskimaj geamiketoj, kiuj amas la poŝton.

En la letero vi skribis: "La Norda Poluso, kie ni loĝas, troviĝas fore de multaj landoj. Ĉi tie ĉio estas blanka — blanka ĉielo, blanka glacio, blankaj ani-

maloj, eĉ niaj domoj estas faritaj el blanka glacio. Kiom ni deziras, ke la poŝta komunikado forte nin kunligu kiel diverskolora rubando, portu leterojn al ĉiuj landoj kaj ĝojon al nia vivo. . ."

Mi eksaltis de ĝojo, leginte la vortojn, ĉar miaj gepatroj kaj fratino ĉiuj estas poŝtistoj, eĉ mia idealo estas fariĝi popola leterportisto en estonteco. Miaj gepatroj rakontas al mi, ke granda kvanto da leteroj el diversaj mondpartoj ĉiutage venas al ilia poŝtoŝticejo. Unuj venas el Aŭstralio, hejmloko de kanguruoj; aliaj el landoj de Afriko traŭrata de la ekvatoro; pli multaj aviadile venas el Eŭropo kaj Ameriko. Iun tagon antaŭ nelonge, ili ricevis vian leteron el "la blanka Norda Poluso". Verdire, la poŝta laboro ja estas bela rubando, ĉie kaj ĉiam plenumas sian servon ĉu en tropika arbaro, ebenejo kun modera klimato, aŭ en la frosta Norda Poluso, kie vi loĝas. Ĉu vi ne trovas ĝian mirindan rolon?

Mi ankoraŭ volas rakonti al vi ion interesan: Iun nokton mi

Postleciona sporta lernejo de Jiangmen

MI ĉiam opinias, ke mi ŝuldas mian sukceson al via diligenta trejnado. Mi ĝojas, ke mi havis tian trejniston kia vi en mia infanaĝo," skribis Xian Liqing, unu el la ĉefaj membroj de la Ĉina Virina Korbopilka Teamo, al sia unua trejnisto Liang Bojin, post kiam la teamo gajnis ĉampionecon en la Naŭa Azia Sportkunveno. Liang Bojin estas korbopilka trejnisto de la Postleciona Sporta Lernejo de Jiangmen en Guangdong-provinco.

La kvar-jara peniga ekzerco, kiun Xian Liqing faris en la lernejo, metis al ŝi solidan bazon por fariĝi elstara ludisto de korbopilko.

La lernejo starigita antaŭ dekelkaj jaroj elbakis ne nur Xian

Liqing, sed ankaŭ aliajn eminentajn sportistojn de gimnastiko, tabloteniso, naĝado, korbopilko k.a.

LULILO DE GEKNABAJ SPORTISTOJ

Jiangmen, kuŝanta sur la delto de la Perla Rivero en Guangdong-provinco, suda Ĉinio, estas urbeto kun 210 000 loĝantoj. La sporta lernejo sin trovas en la centro de la urbeto. Ĝiaj trejnaj metodoj kaj instalaĵoj ne niom diferencas de la aliaj sportaj lernejoj, sed ĝia "Ĉambro de Honoro" ofte vekas apartan atenton de la vizitantoj. Tie estas eksponataj la pokaloj, medaloj kaj silkaj flagoj, kiujn geknabaj sportistoj de la lernejo gajnis en en- kaj eksterlandaj konkursoj.

Oni prave diris, ke la lernejo estas lulilo de eminentaj geknabaj sportistoj en Ĉinio.

La gimnastetoj elkulturitaj de la lernejo 26-hom-foje partoprenis en la Mondaj Mezlernejanaj Sportkunvenoj kaj gajnis 39 orajn, 22 arĝentajn kaj 6 kuprajn medalojn. Kune kun gimnastoj el aliaj lernejoj, ili gajnis ĉampionecon en la vira teama konkurso sinsekve en tri Mondaj Mezlernejanaj Sportkunvenoj.

En la provincaj geknabaj sportkonkursoj sportistoj de tiu lernejo 371-hom-foje gajnis 229 ĉampionecon kaj en tutlandaj konkursoj ĝiaj sportistoj 184-hom-foje 107 ĉampionecon. La lernejo kulturis sume pli ol 1 200 sportistojn por la ŝtato.

Oni devas konfesi, ke tiu mal-

vidis en la sonĝo, ke sidante sur la kolora poŝta rubando, mi flugas blovate norden al la Norda Poluso. Vi aplaŭde bonvenigas min, starante sur blanka glaciobordo. Eĉ polusaj ursoj naĝantaj en glacia akvo plaŭdigas ŝaŭmon, kvazaŭ bonvenigas min, malgrandan gaston el Ĉinio. Mi descendis de la rubando kaj

kune kun vi eniris en glacian domon brilan. Ni ĉiuj dancas, kantas en ĝi, eĉ dika polusa urso endomiĝis kaj ekludis akordionon, ni pasigis belan tempon.

Karaj eskimaj amiketoj, ni invitas vin gastigi en Ĉinio. Ni ĉinoj, kiel vi, estas tre diligentaj, bravaj kaj gastamaj. Se vi volas veni al Ĉinio, bonvolu veturi per

"la poŝta rubando" kaj min viziti. Tiam mi akompanos vin ekskursi al la Granda Muro kaj rigardi la belajn pejzaĝojn de la Okcidenta Lago. Venu tuj! Mi atendas vin, ankaŭ la ĉina popolo atendas vin!
Agrablan Vojaĝon!

Amike via
WANG ZHONGQUN

grand-urba postleciona sporta lernejo akiris vere admirindajn sukcesojn.

SENPAGA TREJNADO

Kiam mi vizitis la lernejon, mi informiĝis de ĝia ĉefo, ke la lernejo funkciigas kursojn de korbopilko, gimnastiko, tabloteniso kaj naĝado, kun 284 lernantoj kaj 16 profesiaj trejnistoj. La lernantoj vizitas la sportan lernejon nur post siaj lecionaj horoj.

Ĉe mia alveno al la gimnastika ĉambrego, juna trejnistino Tan Lihua estis ekzercanta grupon da 7-8-jaraj knabinoj en gambo-disstreĉado.

“Rektigu la piedpinton, levu la kapon, elstarigu la bruston kaj premu la gambon.”

“Bone. Daŭrigu vian ekzercadon tiamaniere. . .”

Ŝi klarigis, ĝustigante la pozon de tiu aŭ alia knabino.

Je la kvara posttagmeze postlecionaj element-lernejoj kelkope venas al la sporta lernejo. Tie iuj el ili ludas tablotenison, aliaj naĝas.

Amatoraj gimnastetoj venas en la gimnastikan ĉambregon, demetas sian libro-sakon, rapide surmetas sian sportveston kaj, post iom da korpo-vigligo, komencas diligente sin ekzerci dum tri horojn sub la gvido de trejnistoj.

Sur ilia vizaĝo legeblas infana naiveco, sed ili plenumis ĉiujn movojn lerte kaj serioze. Kelkaj faris gambo-disstreĉadon sur ruĝa tapiŝo kaj aliaj trunkofleksadon antaŭen apud muro. La trejnistino diris al mi, ke multaj gimnastetoj jam ekkonis la gravecon de fundamenta ekzercado.

Tiuj viglaj, amindaj kaj belaj geknaboj kun aĝo de 7-12 jaroj lernas en elementaj lernejoj. Ili ne nur senpage vizitas la sportan

lernejon, sed ankaŭ ricevas de ĝia subvencion kaj sportvestojn.

La infanoj vizitas la sportan lernejon nur post siaj lecionoj, kaj tio, ĝenerale dirite, ne malhelpas al ili lerni kulturajn sciencojn en siaj lernejoj. Cetere, ili ĉiuj diligente lernas, ĉar alie la trejnistoj ĉesigus al ili la trejnadon.

Pro ĉio ĉi la gepatroj volonte sendas siajn infanojn al la sporta lernejo.

SINDEDIĈO POR LA INFANOJ

Post sia vizito al la Postleciona Sporta Lernejo de Jiangmen, urbestro el Aŭstralio humure diris: “Post kiam mi revenos hejmlandon, mi konsilos niajn sportajn rondojn ne praktiki gimnastikon plu, ĉar ni neniel povos vin venki.”

Kompreneble, la rimarkindaj sukcesoj akiritaj de la malgrandaj sportistoj de la lernejo estas nedisigeblaj de la diligenta laboro de la trejnistoj.

En ĝia gimnastika kurso estas paro da trejnistoj. La edzo, Xiong Heng, ricevis la titolon de Gimnastika Majstro jam en la 60-aj jaroj kaj ankaŭ lia edzino, Lin Muling, estis Sporta Majstrino. Por kulturaj junajn sportistojn ambaŭ ili venis al la sporta lernejo.

Laŭ la karaktero de infanoj ili ellaboris kompletan da originallajn trejnajn metodojn, kiuj forte allogas la geknabojn.

Xiong Heng estas kreema en sia trejnado. Altgrade malfacilajn movojn, kiaj granda unubrakca cirkulo sekvata de de-rekiĝo

La korbopilka teamo de la Postleciona Sporta Lernejo de Jiangmen en trejnado



per du en-aeraj transkapiĝoj kun la korpo fleksita, grandaj cirku- loj sekvataj de 180-grada korpo- returno kaj manstaro sur para- lelo k.a., oni ankoraŭ ne oficiale enmetis tiujn movojn en interna- cianj gimnastikajn konkursojn, pliparto de liaj junaj trejnitoj jam povas fari.

La geedzoj tutkore praktikas sporton kaj apenaŭ zorgas pri si mem. Ili forlasis sian komfor- tan hejmon kaj ĉiutage loĝas en malgranda kaj simple meblita ĉambro de la lernejo. Ili diris, ke estas ja malpli komforte loĝi en la lernejo, sed tio helpas al ilia laboro. Cetere, estas granda plezuro por ili ĉiam resti kune kun la infanoj. Eĉ en siaj liber- tagoj en multaj jaroj ili ekzercas geknabojn, projektas novajn mo- vojn kaj preparas trejnajn pla- nojn.

En la lastaj jaroj la geedzoj elkulturis sume 120 gimnaste- tojn, el kiuj 27 fariĝis eminentaj sportistoj de la ŝtato. En 1982 Xiong Heng estis nomumita vic- estro de la Komisiono de la Fi-

zika Kulturado kaj Sportoj de Jiangmen kaj ĉefo de la lernejo.

MALGRANDAJ TREJNISTOJ

Aparte interesa estas tio, ke la geknaboj trejnataj en la sporta lernejo funkcias kiel malgrandaj trejnistoj.

La sporta lernejo ne nur ple- numas sian enlernejan trejna- don, sed ankaŭ donas atenton al la postleciona sporta trejnado en infanĝardenoj, element- kaj mez- lernejoj de la urbo. Ĝiaj kursoj de gimnastiko kaj tabloteniso konstante kontaktas kun tiuj in- fanĝardenoj kaj lernejoj kaj re- gule sendas siajn lernantojn por ilin helpi.

Helpate de la gimnastika kur- so, 6 infanĝardenoj, 11 elemen- taj lernejoj kaj 2 mezlernejoj de Jiangmen rapide disvolvas sian gimnastikan sporton.

La malgrandaj trejnistoj el la sporta lernejo plenumas sian funkcion metode, serioze kaj pacience.

Foje ĝia 12-jara gimnasteto gvidis element-lernejanon de la unua kaj dua klasoj en gimnasti- ka ekzercado. Post lia klarigo kaj demonstrado, la plejparto de la lernantoj jam scipovis plenumi la movojn, escepte de unu, kiu estis tro malkuraĝa por la plenu- mo malgraŭ ripetita instruado. La malgranda trejnisto iom per- dis sian paciencon, kaj la vorto "sentaŭgulo" estis jam preta eliri el lia buŝo. Sed li ekmemoris sian trejniston en la sporta ler- nejo, kiu, anstataŭ lin riproĉi, ĉiam helpis lin pacience, li do persistis en sia trejnado ĝis la malgranda lernanto sukcese faris la movojn.

Dank' al la klopodo de la sporta lernejo, la fizika kultura- do de la infanĝardenoj, elemen- taj lernejoj, mezlernejoj de la urbo strikte kunligiĝis kun tiu de la sporta lernejo, kaj la ge- knaboj, ekde sia infanaĝo, estas sisteme trejnataj kaj havas soli- dan bazon por maturiĝi en spor- toj, tiel ke la diversaj sporto- branĉoj estas senĉese provizitaj per novaj fortoj.



Tarifo: 1 internacia res- pondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 in- tern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La re- dakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la pro- mesoj faritaj en ili.

* 38-jara Stanislav Kareš, agrono- mo-plantkuracisto, Tylova 1262, 508 Ol Horice, Ĉeĥoslovakio, serĉas agrikulturistojn kaj sam- fakulojn.

* 15-jara lernantino dez. kor. tut- monde pri diversaj temoj, spe- ciale pri biologio kaj kemio. Sipos Julia, Str. Donath Nr. 105, Ap. 20, RO-3400 Cluj-Na- poca, Rumanio.

* Dez. kor. tutmonde pri ĉiuj te- moj. Adreso: Laczko-Angi Rita- Magdolna, Str. Mures Nr. 45, 4214 Ditrau, Harghita, Ruma- nio.


* 16-jara Lorinczy Aniko, vol.

kor. kun samaĝa knab(in)o. Adreso: 4800 Baia-Mare, Str. Olteniei 1/32, Rumanio.

* 20-jara Khol Erika, 6500 Baia, Petofi ut-73, Hungario, deziras korespondi.

* Emerita estro de junulargastejoj deziras korespondi esperante kaj tutmonde pri diversaj temoj: Denny Dennison, 4, Lovestreet Close, Herne Bay, CT6, 7SQ, Britujo.

* S-ro Kimmo Hakala, Hameentie 70 A 8, SF-00550 Helsinki 55 Finnlando, deziras korespondi kun eksperimentbredistoj (an- kaŭ aliaj).




Skulptisto Liu Huanzhang kaj liaj verkoj

Fotoj de LAO BAI

Rememoro pri infaneco




Liu Huangzhang en laboro



Xuemei

Rapsodio



Gruntbovo






Antaŭ spegulo

Huj-nacieca maljunulo




Kokonutrado





Birdnesto

Sen titolo



VIVO LIGITA KUN ŜTONOJ

ANTAŭ mi staras malordema mezaĝulo en vestoj makulitaj, kun larĝa kaj sunbruna frunto kaj bukloj kvazaŭ neniam kombitaj. Liaj fortikaj kaj kalozaj manoj tre similas al tiuj de ŝtonhakisto. En liaj okuloj oni povas legi scivolemon de infano kaj absorbitecon de matematikisto. Li estas fama skulptisto Liu Huanzhang.

En lia laborĉambro montriĝas centoj da skulptaĵoj, kiuj, kiel liaj infanoj, prezentas parton de lia vivo.

En 1954 Liu Huanzhang diplomitiĝis el la skulptura fakultato de la Centra Belarta Instituto kaj eklaboris en la skulptistejo de la instituto. Ekde tiam tiu obstinulo donis sian vivon al la


skulptado de malmolaj materialoj.

En la 50-aj jaroj en la orienta antaŭurbo de Pekino serpentumis malgranda rivero, sur kies bordo troviĝis kelkaj eluzitaj muelŝtonoj forĵetitaj de kamparanoj. Ili forte altiris tiun junan artiston. Malgraŭ varmeĝo en somero kaj frostoj en vintro li laboris super tiuj ŝtonblokoj. Li faris el ili unue diversformajn skulptaĵojn grandajn, poste el la grandaj mezgrandajn kaj fine el la mezgrandaj malgrandajn. Kiam li lertigis sian teknikon per tiuj ŝtonoj, sur la bordo videblis nur amasetoj da ŝtonpecoj en grandeco de ovo.

Kvankam Liu Huanzhang jam posedis teknikon de skulptado, tamen tiam ankoraŭ ne naskiĝis ĉe li verkoj konataj de la publiko. Li do lernis de diversaj skoloj por altigi sian arton.

Eminentaj verkoj de okcidentaj skulptistoj multaj edifis Liu Huanzhang, sed la antikva kulturo de la ĉina nacio kaj tradicia stilo de la ĉina skulpturo des pli lin ravis. En liaj verkoj oni povas vidi influon de la okcidenta skulptarto, sed la stilo restas ĉiam ĉina. En la 60-aj jaroj li vojaĝis al la centra kaj nord-

Liu Huanzhang





Mi komprenas!

okcidenta partoj de Ĉinio. Tie troviĝas multaj antikvaj majstraj skulptaĵoj de Ĉinio. La budhostatuo kun fortaj linioj, pleneformaj kaj zorge aranĝita kontrasto inter rondo kaj kvadrato, kurbo kaj rekto, karakterizitaj per soleneco, delikateco kaj simpleco en skulptado profunde influis lin.

Liu Huanzhang dediĉis sian tutan energion kaj tempon al sia arto. Kvankam la Centra Belarta Instituto provizas lin per ŝtonoj por lia verkado, tamen tio ne povas kontentigi lian grandegan bezonon. Por havigi al si sufiĉe da materialo, li eĉ mem veturigis triciklon aŭ biciklon tra la urbo por kolekti forĵetitajn ŝtonpecojn, lignojn kaj arboradikojn. Lia ligna skulptaĵo "Knabino" estis ĝuste farita el cipresa bruligno aĉetita el vendejo, kaj lia alia verko "Li Bai" el duonpeco da lignotabulo kolektita en konstruejo. Foje li trovis en iu korto bonan ŝtonpecon kaj paŝadis tien reen antaŭ la pordo dum longa tempo. Lia stranga konduto suspektigis la mastron kaj tiu alpaŝis demandi pri lia intenco. Kiam Liu eldiris sian deziron

peti de li la ŝtonon, la mastro tuj konsentis kaj elvokis sian filon por ke li helpu Liu porti la ŝtonon al lia hejmo. Vidinte belajn skulptaĵojn en la ĉambro de Liu, la filo de la mastro profunde kortuŝiĝis de la spirito de la artisto. Li emocie diris al Liu: "En mia hejmo ankoraŭ estas peco da ŝtono, mi reiru porti ĝin al vi."

Skulpturo estas poezio de plastiko. Liu Huanzhang ĉefe esprimas senmovan belecon en siaj skulptitaj homfiguroj. Implicito kaj profundeco karakterizas lian artan stilon. Dum kreado de sia fama verko "Luktisto", anstataŭ esprimi intensajn lukto-movojn, li modlis bravan figuron de luktisto en momento de lia apero antaŭ la publiko. Tiu esprimmaniero lasas la rigardantojn libere pensi kaj imagi. Ĝuste en tio montriĝas forto de bona verko. Ankaŭ liaj verkoj kiaj ligna skulptaĵo "Knabino" kaj ŝtonaj skulptaĵoj "Bona Libro", "Morgaŭ" kaj "Songo" videbligas trajtojn de la ĉina skulptado de budhostatuo. Ili estas karakterizitaj per implicito, majesteco kaj plenececo kaj impresas per

varmece kaj paco. En sia skulptaĵo el blanka marmoro "Sen Titolo", li figuris genuantan knabinon kun la manoj kovrantaj la vizaĝon. Kiu povas resti indiferenta antaŭ tiu knabino, pura kiel marmoro, en granda afliktiĝo kaj senelirejo? Granda eĉo estas vekita de la artisto ĉe la rigardantoj por bonkoreco kaj moralaj fortoj.

Ankaŭ la bestoj figuritaj de Liu Huanzhang plenas de varmece kaj sentoj. La ennestaj birdetoj skulptitaj el arboradiko tre similas aron da naivaj infanoj en infanĝardeno. La antilopoj skulptitaj laŭ la naturaj vejnoj de ligno havigas impreson, ke ili ĉiam pretas por forkuri je ĉiu malgranda bruo. Lia sovaĝa bovo kun alte kurbigita dorso sentigas,

Patrino kun sia filo




kvazaŭ ĝi, forte incitite, volus fari mortan lukton.

Por skulptistoj nesondebla lagakvo kaj ĝiaj surfacaj ondetoj estas kunligitaj en unu tuton. La profundeco de pensado de Liu Huanzhang koincidas kun tiu de lia esprimado. Oni povas diri, ke liaj artaĵoj prezentas kaj kolorojn kaj ritmon kiel poezio.

Shen Chaohui, la edzino de Liu Huanzhang, estas bela kaj silentema virino kun alta klereco en literaturo kaj arto. Ŝi bone komprenas sian edzon kaj senplende prenas sur sin ĉiujn hejmajn laborojn. Ŝi zorgas la aferon de la edzo kaj helpas lin en kolektado kaj ordigado de materialoj. Ilia kara filino Lalan estas bona lernanto en mezlernejo de Pekino. Tre feliĉa kaj harmonia estas ilia familio!

Somere de 1981, en la Ĉina Belarta Domo en Pekino okazis unuafoje ekspozicio de la verkoj de Liu Huanzhang. Ĝi altiris multajn rigardantojn. Iu fama pentristo, rigardinte liajn verkojn, diris kun emocio: "En liaj verkoj troviĝas krudeco de grandaj hakoj kaj delikateco de brodado. Ja estas tre malfacile por unu persono elfari tiom grandan nombron da artaĵoj el malmolaj materialoj!" Aliaj rigardantoj diris: "La artisto kondukas nin en la noblan spiritan mondon." "Ĉi tie ni vidis bildon de nia vivo."



Kolorriĉaj kostumoj kaj ornamaĵoj de mjaŭ-aj virinoj


de CHEN XIWEI

EN la provinco Guizhou de Ĉinio vivas multaj naciminoritatoj, inter kiuj mjaŭ-oj estas unu el la naciecoj kun granda membraro. La mjaŭ-oj loĝas tre dise en la provinco, sed plej parte en la montaro Miaoling kaj ĉe la rivero Qingshui. Antaŭ nelonge, kun granda intereso, mi kaj kelkaj aliaj pentristoj vizitis la malproksiman lokon. Kiel verda silka rubando, la rivero Qingshui zigzagas en la ondiĝanta montaro. Ĉio en la montvilaĝoj de mjaŭ-oj altiris al si nian atenton, kaj la plej interesaj estas la kostumoj kaj ornamaĵoj de mjaŭ-aj virinoj.

La kostumoj de mjaŭ-oj de Guizhou sin karakterizas per diversaj fasonoj, aparta nacia stilo kaj artaj specialaĵoj. Mjaŭ-oj portas diferencajn vestojn pro la

malsameco inter la naturaj kaj ekonomiaj kondiĉoj, kulturaj niveloj kaj kutimoj de iliaj hejmlokoj. Virinoj eĉ en du najbaraj vilaĝoj portas tre malsamajn vestojn. Laŭ historiaj notoj, estas pli ol 80 specoj de virinaj vestoj, ĝenerale en du grupoj, unu por ordinaraj tagoj kaj la alia por festoj. La festaj kostumoj de mjaŭ-aj virinoj estas tre delikataj. Por tion fari, virinoj devas plene dediĉi sian energion kaj artisman por 4-5 jaroj.

Mjaŭ-aj virinoj ŝatas ornamis sin per arĝentaj orelopediaĵoj, braceletoj, kolieroj, ĉeno, diademoj k.s. La tuta kompleto da arĝentaj ornamaĵoj portataj de virinoj pezas iukaze eĉ 5 kilogramojn. La plej delikataj kaj komplikaj el ili estas la kapornaĵoj. La plej ofte vidataj kapornaĵoj prezentas vivecajn birdon,



Mjaŭ-a knabino en Guizhou-provinco

papilion, galopantan ĉevalon, drakon, fenikson k.s.

Ankaŭ la hararanĝoj de mjaŭ-aj virinoj havas apartan guston. La virinoj ĝenerale havas hartuberojn diferencajn laŭ la aĝo, edzineco kaj fraŭlineco. En iuj lokoj adoltaj virinoj kutime havas kombilon kaj tuketon sur la kapo. La kombilo estas delikate gravurita, foje eĉ el arĝento; la tuketo estas blanka, nigre brodita. Kaj en iuj aliaj lokoj la tuketo estas vakse tinkturita en bluo kaj blanko.

La mjaŭ-aj virinoj tutjare portas centfaldan jupon. Pri la jupo

ĉirkuilas tiuloke jena popolrakonto: Antaŭ tre tre longe vivis junulo. Foje li kaptis oran pavon sur monto kaj donacis ĝin al sia laborema amatino. Ricevinte la pavon, la knabino komencis ornamati sin laŭ ĝia aspekto — ŝi faris al si altan hartuberon en la formo de ĝia kresto, ŝiaj larĝaj manikoj similis al ĝiaj flugiloj kaj la dense faldita jupo similis al la disetendita vostoplumaro. Poste oni plibeligas la jupon per diversaj pasamentoj.

La jupo de mjaŭ-aj virinoj havas diversajn fasonojn. La virinoj loĝantaj en valoj aŭ ĉe riveroj

portas jupon longan ĝis sub la genuo aŭ ĝis la piedoj, dum la virinoj en altaj montoj portas jupon longan ĝis la genuo kaj iuj eĉ portas jupon longan je ĉ. 6 coloj simile al baletjupeto. Virinoj en kelkaj lokoj de Leishan-gubernio kutimas porti strian jupon. Ili faras sian jupon el multaj broditaj ŝtofstrioj.

La desegnoj sur la vestoj de mjaŭ-aj virinoj fidele prezentas la realan vivon. La naturaj pejzaĝoj, la abundaj produktaĵoj, la tradiciaj popolrakontoj, ĉiuj estas abunda fonto de desegnaĵoj por iliaj vestoj. Ekzemple, drako simbolas riĉan rikolton pro favora klimato, kaj fiŝo — riĉan vivon. Parto de la desegnoj spegulas tieajn morojn, ekzemple remkonkurson de drakoŝipoj kaj procesion de nupto. Ankaŭ peonio, granato, persiko kaj sovaĝaj floroj kaj fruktoj estas ŝatataj temoj de ilia desegnado. La desegnaĵoj estas majstre aranĝitaj, delikataj kaj vivecaj. Ili ne estas simpla kopio de natura pejzaĝo, sed arta kreaĵo bazita sur la reala vivo, pli bela ol ĝi. La uzataj koloroj por la objektoj ne estas limigitaj de iliaj naturaj aspektoj. La mjaŭ-aj akcentas ornamecon, abstraktecon kaj troigon por esprimi siajn perceptojn pri la objektiva mondo kaj amon al la vivo. Ili havas infanan imagemon kaj iliaj desegnaĵoj ofte amuzas per sia humuro. Ekzemple ili aliformas la voston de fazano en disvolviĝontan florbranĉon, kokokreston en florbukedon, branĉon da granat- aŭ persikfloroj. Kelkiam ili pentras sur birdo skvamojn de fiŝo, aŭ papiliajn flugilojn. La kontraŭnaturaj aranĝoj estas ŝajne strangaj, tamen aspektas okulplaĉaj kaj gustoplenaj.

En sia infanaĝo la mjaŭ-aj virinoj jam eklernas fari vestojn,

Nacia emblemo de Ĉinio

de MEI ZHI

LA nacia emblemo de la Ĉina Popola Respubliko konsistas en la bildo de la nacia flago, Tian'anmen-pordego, dentrado kaj du garboj da tritika kaj riza spikoj. Ĝi simbolas la batalon de la nov-demokratia revolucio de la ĉina popolo, komencitan de la Majkvara Movado kontraŭ Imperiismo kaj Feŭdismo en 1919, kaj la fondiĝon de la nova Ĉinio, kiu praktikas la popol-demokratian diktaturon gvidatan de la laborista klaso kaj ba-

zitan sur la laborist-kampana alianco.

En julio 1949, la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco publikigis la anoncon por varbi la projektojn de la nacia emblemo. Laŭ la postuloj, la nacia emblemo devas esti majesta kaj impona, enkorpigante en si la trajtojn de la ŝtato kaj ĝia regpotenco. En unu monato post apero de la anonco, la konferenco ricevis 112 projektojn kun

900 bildoj senditajn de enlandaj popolanoj kaj elmigrantaj ĉinoj. Sed neniu el ili estis elektita. Tial, en la lasta tagdeko de septembro 1949 la Plena Sesio de la Konferenco aprobis nur la projektojn de la naciaj flago kaj himno, sed ne la projekton de la nacia emblemo.

Poste, la Unua Komitato de la Konferenco decidis, ke la Arkitektura Fakultato de Qinghua-universitato kaj la Centra Belarta

kiuj bezonas brodadon, vakstink-turon kaj plektadon. La junulinoj devas senĉese kudradi por si novedzinajn vestojn. Havante potencon amasan bazon, la popola arto de vesta ornamado herediĝas de generacio al generacio kaj dank' al tio la kostumoj de mjaŭ-aj virinoj fariĝas pli kaj pli belaj.

Knabinoj de Kaili en brodado



Instituto respektive starigu la grupon por projekti la nacian emblemon. La du grupoj ekfunkciis en la komenco de 1950. La projektantoj de la nacia emblemo kolektis opiniojn de diversrondaj personoj, komparis ĉiujn projektojn, konsultis multajn materialojn kaj fine ellaboris sian projekton inter majo kaj junio samjare.

Vespere de la 20-a de junio, la Grupo de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco por Ekzameni kaj Difini la Nacian Emblemon diskutis lastfoje la projekton de la nacia emblemo. Ĉefministro Ĝou Enlaj persone prezidis la diskuton. La ĉeestantoj unuanime elektis la projekton de Qinghua-universitato. Meze de la bildo estas la fasado de Tian'anmen-pordego


prilumata de 5 steloj de la nacia flago supre. La projektintoj klarigis, ke Tian'anmen-pordego simbolas la lulilon de la Majkvara Movado en 1919, per kiu komenciĝis la nov-demokratia revolucio de Ĉinio, kaj la ĉefurbon Pekino de la nova Ĉinio. La nacia emblemo estas nur en la ruĝa kaj ora koloroj, la tradiciaj koloroj kutime uzataj de la ĉina nacio, ĉar ili aŭguras "feliĉon" kaj "ĝojon".

La 23-an de junio, la Plena Sesio de la Konferenco aprobis la projekton. La 28-an, la Centra Popola Registaro sankciis la proponitan projekton de la Konferenco. Poste, iu gravuristo reliefigis la nacian emblemon.

La bildo de la difinita nacia emblemo estas ĉirkaŭprenita de


du garboj da tritika kaj riza spikoj, ĉe kies malsupra kruciĝo troviĝas dentrado kun ruĝaj kvastoj pendantaj ĉe ambaŭ flankoj. La dentrado estas dividita de la ruĝaj kvastoj en la du partojn, supran kaj malsupran. La dekstra kaj maldekstra partoj de la emblemo sidas en simetrio. La jena bildo donas al la legantoj ĝustajn lokiĝon kaj proporcion de la emblemo. En la bildo la spikoj, 5 steloj, Tian'anmen-pordego kaj dentrado estas orkoloraj, kaj la fono, cirklo kaj kvastoj ruĝaj.

La 20-an de septembro 1950, Maŭ Zedong, prezidanto de la Komitato de la Centra Popola Registaro, publikigis per la speciala dekreto la bildon de la nacia emblemo de la Ĉina Popola Respubliko.



1 Tritika kaj riza spikoj
2 Cirklo
3 Granda stelo

4 Malgranda stelo
5 Tian'anmen-pordego
6 Dentrado



Kvin Dinastioj, Dek Regnoj kaj Regnoj Liao, Okcidenta Xia kaj Jin

de BA HONG

POST la pereco de Tang-dinastio Ĉinio dronis en splitiĝo. En Ĉinio sinsekve aperis la kvin dinastioj kaj dek regnoj. En la plej norda regiono de Ĉinio aperis nacimalplimultaj reĝimoj Liao, Okcidenta Xia kaj Jin.

LA KVIN DINASTIOJ KAJ DEK REGNOJ

En tiu periodo la regpotencoj ofte estis anstataŭitaj unu de la alia, kion kaŭzis la separatisma situacio de la lokaj militaristoj post la meza periodo de Tang-dinastio. La kvin dinastioj (907-960 p. K.) estis la postaj Liang, Tang, Jin, Han kaj Zhou, kiuj sinsekve okupis la regionon de la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero. Ankaŭ la militistaj klikoj en aliaj lokoj sinsekve aŭ samtempe sendependiĝis kaj starigis separatismajn regnojn: Wu, Wuyue, Suda Tang, Antaŭa Shu, Posta Shu, Chu, Suda Han, Min, Nanping kaj Norda Han. Oni nomis ilin dek regnoj en la ĉina historio.

Tiuj separatismaj regnoj militadis inter si kaj aneksis unu alian por akiri pli da teritorio, kio kaŭzis al la popolo profundan malfeliĉon.

La impostoj estis tre pezaj. Oni kolektis, krom la rektaj impostoj, ankaŭ diversajn kromajn impostojn, ekz., salimposton laŭ familio, imposton pro “birdorata konsumado”, kapo-imposton kaj agrikulturilan imposton. Krom tio la lokaj oficistoj senkrupule ekspluatis la popolon. Iu oficisto de la Posta Jin senbride superimpostis. Kiam li forlasis sian oficon, la loĝantoj diris ĝoje: “Ni tre ĝojas, ke la dorno en la okulo estas eltirita!” Sed post nelonge tiu fiulo revenis al la antaŭa ofico kaj eĉ prenis “dornoeltiran” imposton de la popolanoj. En Wu-regno iu oficisto estis transpostenigita, sed la loĝantoj kuraĝis diri nenion, ili esprimis sian ĝojon nur per rigardo kaj barbo-kareso. Post nelonge li revenis al la antaŭa ofico kaj impostis eĉ “barbo-karesadon” al la popolanoj.

La bataloj inter la militistaj klikoj multe damaĝis la socian ekonomion. En tiaj malfacilaj kondiĉoj la laboranta popolo ankoraŭ persistis en produktado, tiel ke iom post iom reprosperegis kaj disvolviĝis la detruita ekonomio. Precipe en la sudo, kie malofte okazis milito, la socia vivo estis kompare stabila, kaj la ekonomio disvolviĝis rapide. Ekz., la regnoj Chu, Suda Tang kaj Wuyue ĉiuj atentis konstruadon de digo por konservi akvon kaj irigacii kampojn. Dank’ al tio ili akiris riĉajn rikoltojn en la agrikultura produktado.

Surbaze de tio multe disvolviĝis ankaŭ sal-farado, te-farado, ŝip-konstruado, paperfarado, porcelanaĵ-produktado, metalurgio, tekstilado, tinkturado kaj aliaj metioj.

La porcelanaĵoj en la periodo de la Kvin Dinastioj estis fame konataj. La porcelanaĵoj bakitaj de Chaiyao (ĉe la nuna Zhengzhou de Henan-provinco) estis



*Fresko de Liao-dinastio trovita en tombo
en Xuanhua-gubernio, Hebei-provinco*

belaj. Oni laŭdas, ke ili estas bluj kiel ĉielo, brilaj kiel spegulo, maldikaj kiel papero, kaj ilia sono similas al tiu de sonorilo. La nigro-blujaj porcelanaĵoj baktaj de Yuezhou (en Zhejiang-provinco) estis belformaj, ĉarme desegnitaj kaj jade glazuritaj.

Ankaŭ la komerco en la sudo disvolviĝis. La apudmaraj Fuzhou, Quanzhou, Kantono kaj Hangzhou fariĝis famaj komercaj urboj. Tiam multaj ŝipoj ankriĝis ĉe la enfluejo de Qiantang-rivero ĉe Hangzhou. Multaj komercistoj aktivadis en Chengdu kaj Jiankang (la nuna Nankino), kie abundis diversaj varoj. Inter la lokoj, precipe inter la sudo

kaj nordo, ofte okazis var-interŝanĝo. Komercistoj de la Suda Tang ŝanĝis ŝafojn kaj ĉevalojn per silko kaj teo kun la nordo. Ankaŭ la regnoj Chu, Min kaj Wuyue per teo faris grandan negocon kun la nordo.

La lasta imperio de la Kvin Dinastioj estis la Posta Zhou. En 960 p. K. Zhao Kuangyin, komandanto de la imperia gvardio, faris ŝtatrenverson kaj fondis la Nordan Song-dinastion (960-1127 p. K.).

FONDIĜO DE LA REGNO LIAO

La nordaj nacimalplimultaj regnoj Liao, Okcidenta Xia kaj

Jin sinsekve kunekzistis kun la Norda Song-dinastio.

Liao estis regno de ĉidan-anoj, kiuj sin vivtenis per fiŝado, ĉasado kaj paŝtado en la supra baseno de Liao-rivero en nord-orienta Ĉinio dum la 4-a jarcento. Ĉirkaŭ la 7-a jarcento hanoj senĉese transloĝiĝis en la regionon loĝatan de ĉidan-anoj kaj kulturebligis teron por vivtenado. Ili alportis ankaŭ al la regiono avangardan produktan teknikon. Dank' al tio la ĉidan-anoj iom post iom ellernis terkulturon, teksadon, fero-faradon kaj domkonstruadon kaj komencis fiksloĝan vivon.

En 916 p. K. ilia tribestro

Abaoji abolis la elektan sistemon de klana socio, imperiestriĝis kaj fondis regnon Ĉidan de sklavoposedata sistemo laŭ la hancieca sistemo. Li instalas novajn ŝtatajn oficojn, kreis skriban ĉidan-lingvon kaj gramatikon. En 947 p. K. lia filo Yeludeguang surtroniĝis kaj alinomis sian regnon Liao.

Liao-regno foje kaj foje faris priraban militon al la regiono regata de la Norda Song. En la deka jarcento, kiam potenciĝis la regno, ĝi okupis vastan teritorion ampleksantan la Japanan Maron, la enfluejon de Heilongjiang-rivero en la nordoriento, la Altajon en la okcidento, la regionojn norde de la Ekstera Xingan-montaro en la nordo, la nordan parton de la nunaj provincoj Shanxi kaj Hebei en la sudo.

LA REGNO OKCIDENTA XIA

La loĝantaro de la Okcidenta Xia konsistis ĉefe el dangŝjanganoj, branĉo de la antikva naci-malplimulto Ĉjang de Ĉinio. Ili antaŭe loĝis en Qinghai-provinco kaj la nordokcidenta parto de Sichuan-provinco. Ili vivis nomade kaj ĉasade en klana socio. Poste la dangŝjanganoj transloĝiĝis en la limregionon inter la nunaj provincoj Shaanxi, Gansu kaj la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. En la 9-a jarcento la nacieco sin okupis pri brutobredado kaj ankaŭ pri agrikultura produktado. Ĝia ĉefo ricevis oficialan titolon donitan de imperiestroj de la dinastioj Tang kaj Song.

En 1038 p. K. Yuanhao surtroniĝis fondinte regnon Xia,

kiun la historiistoj nomis la Okcidenta Xia. Li elektis Xingqing (la nuna Yinchuan de Ningxia) kiel sian ĉefurbon, starigis ŝtatajn oficojn laŭ la sistemo de Song-dinastio kaj kreis skriban lingvon laŭ la hancieca ideografiaĵoj. Poste la regno potenciĝis, ĝia armeo nombris 700 000 militistojn. Ĝi ofte invadis la landlimon de Song-imperio. En la konfliktoj inter Song kaj Liao, la Okcidenta Xia ofte alianciĝis kun Liao por kontraŭstari Song.

La regiono regata de la Okcidenta Xia limtuŝis la Flavan Riveron oriente, Yumen (okcidente de Dunhuang-gubernio de Gansu-provinco) okcidente, Xiaoguan (sudoriente de Guyuan-gubernio de Ningxia) sude kaj la Grandan Dezerton norde.

La Okcidenta Xia ekzistis 190 jarojn kaj estis pereigita de la mongoloj en 1227.

LEVIĜO DE NÜZHEN

Kiam la konflikto inter Song en unu flanko kaj Liao kaj la Okcidenta Xia en la alia flanko ankoraŭ ne finiĝis, leviĝis la alia regno Jin en la nordorienta parto de Ĉinio kun Nüzhenanoj kiel la ĉefa loĝantaro. La praavoj de Nüzhen-nacieco vivis en la baseno de Songhua-rivero kaj ĉe Changbai-montaro. Ili vivtenis sin per fiŝado kaj ĉasado sen fiksa loĝejo. En milda vetero ili loĝis en lokoj riĉaj je akvo kaj herboj. Vintre ili fosis kavernojn ĉe montpiedo, ŝirmis ilin per lignotabuloj kaj loĝis en ili.

Nüzhen-nacieco havis dekojn da triboj, el kiuj la relative gran-

da nomiĝis Wanyan. De post la meza periodo de la 10-a jarcento, la tribo Wanyan komencis konstrui domojn, kulturi grenajn plantojn sude de Harbin de la nuna Heilongjiang-provinco kaj ellernis produkti lignokarbon kaj feron. En la 11-a jarcento Wanyan iom post iom potenciĝis kaj ekregis la vastan regionon de la basenoj de la riveroj Heilong kaj Wusuli.

En 113 p. K., kiam Aguda fariĝis tribestro de Wanyan, Nüzhen ankoraŭ estis regata, subpremata kaj ekspluatata de Liao. Tiu lasta perforte postulis, ke ili ĉiujare tributu ginsengojn, zibel-felojn, perlojn kaj aliajn valorajojn, kaj aĉetis la valorajojn je malalta prezo. Tio kaŭzis al la Nüzhen-a popolo fortan malkontenton. Aguda decidis sin liberigi el la sklavigo de Liao. Per negranda armeo li plurfoje venkis la grandan armeon de Liao kaj okupis vastan teritorion oriente de Liao-rivero. En 1115 Aguda imperiestriĝis kaj nomis sian regnon Jin. En triumfo li puŝis sian armeon antaŭen kaj faris interkonsenton kun Song kune ataki Liao per tenajla manovro. Fine li pereigis Liao-regnon en 1125. Post du jaroj Jin-regno pereigis la Nordan Song kaj plurfoje komandis sian armeon al la Suda Song-dinastio fondita de la frato de la imperiestro de la Norda Song-dinastio.

Sub kontinua premado de Jin-armeo la Suda Song foje-refoje translokis sian ĉefurbon suden ĝis kiam ĝi oficiale lokis en 1138 sian ĉefurbon en Lin-an (la nuna Hangzhou de Zhejiang-provinco), kaj post tio la situacio stabiligis.




FIZIOTERAPIO POR KOLSPINA MALSANO

de HUANG MEIGUANG



1



2



3



4



5



6



7

KOLSPINA malsano ofte suferigas maljunulojn. Ĝia ĉefa simptomo estas doloro ĉe la kolo kaj ŝultroj, kaj ekstera premo al nervaj radikoj povas kaŭzi doloron eĉ al la antaŭaj brakoj kaj la manoj. Al paciento de grava kolspina malsano okazas malfortiĝo de haŭta sento kaj muskola atrofio en koncernaj korpopartoj. Se la spina medolo estas premita, tio povas kaŭzi hazarde malpezan paralizon al la malsupraj membroj.

Por preventi kolspinan malsanon, maljunaj homoj ne devas teni saman pozon longe dum legado, skribado aŭ laborado, nek uzi tro altan kapkusenon dum dormado, ktp. Se ili ofte partoprenas en sporta aktivado taŭga por maljunuloj, tio povas multe redukti kazojn de tiu malsano.

Ne tre serioza suferanto povas preni sedativon, akupunkturon, masaĝon aŭ fizioterapion. Al serioza suferanto oni devas samtempe fari kolan tiradon. Nur malmultaj suferantoj bezonas operacion.

KURACADO PER TIRADO

Suferanto povas instali simplan framon de tirado kun pulio,

pretigi triangulan rimenon por tiri la kolon, ligi sablosakon, de 5 kg. ĝis 10 kg., eĉ 15 kg., sur la alia fino de la ŝnuro tra la pulia kavo (bildo 1). Ĉiufoja tirado daŭru duon-horon, ĉiutage unu- aŭ du-foje. Maljunulo suferanta hipertension devas diskrete apliki tiun kuracadon. Kiam al suferanto okazas kapturniĝo aŭ vomemo, li devas provizore ĉesigi la tiradon, aŭ mallongigi la tempon aŭ malpezigi la sablosakon.

KURACA GIMNASTIKO

Suferanto de kolspina malsano devas ekzerci la muskolojn de la kolo, dorso, ŝultroj kaj la supraj membroj kaj la kolspinan funkcion. La ofte farataj ekzercoj estas jenaj:

1. Bati per la manoj malplenajn aŭ kun halteroj pezaj je 1-2 kg. antaŭen-flanken, flanken kaj supren 6-8-foje (bildo 2). La manbatado kaj manretirado devas esti fortaj.

2. Fleksi la kubutojn, forte movi ilin posten, samtempe elstarigi la bruston, fine repreni normalan pozon de la ŝultroj kaj brusto. Ripeti la movojn je 8-12 fojoj (bildo 3).

**LA UNUA GIGANTA
KOMPUTERA SISTEMO DE
ĈINIO TRAPASIS EKSPER-
TIZON**

Ĉinio sukcese projektis kaj elfaris sian unuan gigantan komputeran sistemon, kiu povas fari cent milionojn da vektoraj kalkuloj sekunde. La sistemo jam trapasis ŝtatan ekspertizon.

La sistemo nomiĝas "Lakta Vojo". Ĝi estas komputero plej granda en Ĉinio, kun plej rapida operacio, plej granda memora kapacito kaj plej potenca funkcio.


Tio signifas, ke Ĉinio enviciĝis inter la farantoj de gigantaj komputeroj en la mondo kaj atingis novan stadion en disvolvo de komputera tekniko.

**LA PEKIN-QINHUANGDAO-A
FERVOJO ANTAŬDATE
KONSTRUITA**

La du-traka fervojo longa je

281 km. komenciĝis de Shuangqiao de Pekino kaj finiĝis en Qinhuangdao de la provinco Hebei. En la 20-a de decembro 1983 oni plenu-

Supera komputero farita de Ĉinio en operaciado



3. Meti la manojn post la kapon kaj kruce kunligi la dek fingrojn, forte ĵeti la kapon posten por ke ĝi estu iom malhelpata de la manoj. Ripeti la movojn 6-8 fojojn (bildo 4).

4. Fleksi la korpon kaj la kapon maldekstren kaj dekstren alterne, respektive 4-6 fojojn.

5. Unue, forte levi la ŝultrojn kaj mallevi ilin; due, levi la ŝultrojn kaj poste turni ilin forte kaj cirkle, antaŭen kaj malantaŭen mallevi ilin. Ripeti la movojn je 4-6 fojoj (bildo 5).

6. Fleksi la kubutojn kaj etendi la manojn respektive ĝis la ŝultroj, cirkle turni la kubutojn laŭeble plej grandsvinge, antaŭen kaj malantaŭen alterne.

Respektive ripeti la movojn je 6-8 fojoj.

7. Mallevi la kapon antaŭen ĝis apero de tiro-sento ĉe la nuko, iom poste, forte movi la kapon posten. Ripeti la movojn je 6-8 fojoj (bildo 6).

8. Forte klini la kapon dekstren kaj maldekstren kun malgranda paŭzo dum ĝi restariĝas en normala pozo. Ripeti la movojn je 6-8 fojoj (bildo 7).

9. Turni la kapon flanken, restarigi ĝian normalan pozon kaj turni ĝin aliflanken post momento. Ripeti la movojn je 6-8 fojoj.

10. Unue turni cirkle la kapon de maldekstre dekstren. Post momento turni ĝin inverse. La

kapoturnado devas esti farita kiel eble plej grandsvinge kaj malrapide. Ripeti la movojn je 6-8 fojoj.





Specialaj poŝtmarkoj "Cignoj" emisiitaj de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio en 1983

mis ĝian tutan trako-metadon. La fervojo estas unu el la gravaj konstruaj objektoj de Ĉinio, parte utiligante fremdlandan prunton. Ĝi servos kiel unu el la ĉefaj vojoj por transporti karbon kaj aliajn materialojn de Shanxi-provinco al nordorienta Ĉinio kaj la havenurbo Qinhuangdao. Ĝia antaŭdata konstruiĝo ne nur pli frue portos al la ŝtato ekonomian efikon, sed ankaŭ favoras ĝian sekvantan elektrizadon.

RAPIDE DISVOLVIĜOS LA ĈINA AŬTA INDUSTRIO

En 1985 al la aŭta industrio de Ĉinio okazis granda renovigo. Oni raciigis la strukturon de entreprenoj, fortigis administradon, enkondukis avangardajn teknikojn kaj alprenis diversajn rimedojn por transformi ĝian teknologion. Dank' al tio la ĉina aŭta industrio ekflugos laŭ moderna vojo.

Nun Ĉinio produktas ne nur ordinarajn pasaĝer- kaj ŝarĝ-aŭtojn, sed ankaŭ pli ol 300 aŭtospecojn

de 11 kategorioj. Ankaŭ la kvalito de aŭtoj altiĝis rimarkinde.

ŜOSEA PONTO KONSTRUATA SUPER LA FLAVA RIVERO

La Zhongning-a Ŝosea Ponto super la Flava Rivero, la plej longa en ĝia supra parto, estis konstruata en decembro de 1983.

La ponto situas ĉe la pramejo Shikong, kvar kilometrojn norde de la gubernia urbo Zhongning en la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. Laŭplane la ponto estos finkonstruita post tri jaroj.

FINKONSTRUIGIS LA LONGONDA TEMPO-ANONCA SISTEMO DE LA SHAANXI-A OBSERVATORIO

Antaŭ nelonge finkonstruiĝis kaj trapasis ekzamenon la unua longonda tempo-anonca sistemo de la Shaanxi-a Observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Dank' al ĝi, Ĉinio levis sian tempo-

anoncan precizecon de milisekunda nivelo al la mikrosekunda, kaj tiel paŝis en la avangardan vicaron de la mondo. Kun la antaŭa kurtonda tempo-anonca sistemo la Shaanxi-a Observatorio fariĝis tempo-anonca centro de Ĉinio.

La sistemo estas scienc-esplora instalaĵo kun kompleksa tekniko. Ĝi okupas areon de pli ol 30 hektaroj kaj havas domojn kun konstrua areo de pli ol 50 000 kvadrataj metroj, en ili instaligis pli ol 1 400 ekipaĵoj kaj mezuriloj.

MINIATURA HIDROGENERATORO ELFARITA

La unua miniatura hidrogenatoro de Ĉinio por kampana familio estas sukcese elfarita en la provinco Jiangsu. Profesoroj kaj fakuloj de la Orient-Ĉinia Akvo-utiliga Instituto kaj aliaj unuoj same opiniis ke ĝi atingis aŭ superis ĉiujn teknikajn normojn de la projekto, laboras stabile, postulas malmultan produktan koston kaj meritas plivastigon.

Ĝi pezas 25 kilogramojn kaj postulas nur simplan konstruadon. La generatoro povas aŭtomate reguligi la tension laŭ ŝarĝo, sen zorgo de teknikisto. Por produkti elektron necesas nur konstanta akvofluo larĝa kiel bovlo, kun tri-metra falakvo. Oni povas instali ĝin ĉe mont-fonto, elfluejo de lageto, irigacia kanalo kaj industrie eluzita akvo. Ĝia kapacito estas 600 ĝis 750 vattoj. Ĝi servas por projekcii filmon, pumpi akvon, disvolvi kamparajn kromokupojn kaj liveras malmultekostan elektron por geologia prospektado, paŝtado sur stepo, irigaciado sur ebenaĵo kaj turismo.

2.8 MILIARDOJ DA ĈINAJ POŝTMARKOJ EMISIITAJ EN 1983

En 1983 Ĉinio emisiis 21 seriojn da memorigaj kaj specialaj poŝt-

markoj, kies emisiita kvanto atingis 600 milionojn da pecoj. Inkluzive de la ordinaraĵoj poŝtmarkoj, Ĉinio emisiis entute 2.8 miliardojn da poŝtmarkoj.

Por mildigi elspezon de milionoj da filatelistoj, la ĉina poŝtmarko-emisia fako limigis la valuton de la poŝtmarkoj.

25 000 ĈINOJ STUDAS EKSTERLANDE

Depost 1978 Ĉinio sendis proksimume 18 500 personojn ŝtate subvenciitajn al 54 landoj por studi en tieaj altaj lernejoj. El ili 7 000 jam revenis fininte sian studon. Inter la senditoj estas ordinaraĵoj studentoj, esplorstudentoj por magistrecado kaj doktoreco, kaj pli multaj vizitaj erudiciuloj kaj fakuloj por perfektigo.

Mempaga studo en fremda lando estas unu el la kanaloj de Ĉinio por kulturaj fakuloj. Nun jam 7 000 mempagaj studentoj de Ĉinio studas eksterlande, ĉefe en Usono kaj Japanio.

ĈINIO PARTOPRENOS ĈI-SOMERAJN OLIMPIKOJN

Ĉinio sendos sian sportan delegacion al la 23-aj Someraj Olimpikoj okazantaj en Usono.

La delegacio kun 200 sportistoj decidis konkursi en 15 sportbranĉoj. Cetere aliaj 4 sportbranĉoj estos deciditaj nur post la preparaj konkursoj por la olimpikoj, nome virina korbopilado, virina manpilado, akvopilado kaj moderna pentatlo.

La partoprenontoj estas ĉefe tiuj, kiuj akiris bonan sukceson en la Azia Sportkunveno en 1982 kaj la Kvina Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio en 1983.

KRESKIS LA NOMBRO DE ĈINAJ CENTJARULOJ

La tria tutlanda censo de Ĉinio montris, ke en la 29 provincoj,

municipoj kaj aŭtonomaj regionoj estas sume 3 765 maljunuloj kun aĝo de pli ol cent jaroj, kaj la plej aĝa estas 130-jara kamparano Kubanyake de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Inter ili estas 2 657 virinoj kaj 1 108 viroj. Plimultaj el ili vivas en kamparo, ĉefe en nordokcidenta, centra-suda kaj sudokcidenta Ĉinio. La proporcio de centjaruloj en la naciminoritatoj estas pli alta ol tiu en Han-nacieto.

LA BERLINA OKTETO DE DR GERMANIO EN ĈINIO

En decembro de 1983 la Berlina Okteto de la Demokratia Respubliko de Germanio sukcese faris koncertojn en Ŝanhajo, Nankino kaj Pekino.

La muzikistoj ludis komponaĵojn de Mozart, Haydn kaj Schubert. Iliaj kvinteto, septeto kaj okteto trovis varman aprobon ĉe la spektantoj. Ĉinaj muzikistoj laŭdis, ke ili ludis akorde, ĉarme kaj lerte, prezentis la komponaĵojn delikate, precize kaj serioze.

KULTURA KAJ SPORTA INTERŜANĜO INTER ĈINAJ KAJ JAPANAJ GEJUNULOJ KAJ GEKNABOJ

En decembro de 1983 la Unua Vizitgrupo de Japanaj Gejunuloj kaj Geknaboj por Amikeco kaj Interŝanĝo vizitis Ĉinion. La 355-membra vizitgrupo organizita de la japana novaĝ-agentejo "Ĉiutagaj Novaĝoj" faris unusemajnajn amikajn aktivadojn en Pekino, kiaj ekspozicio de kaligrafiaĵoj, pentraĵoj kaj fotoj de japanaj lernantoj, prezentado kaj flugpilka konkurso kun pekinaj mezlernantoj.

APEROS "ĈINA BELARTA KOLEKTO"

Ĉinio kompilis kaj eldonos la albumon "Ĉina Belarta Kolekto", kiu montros atingojn de Ĉinio en belarto de diversaj tempoj. La kolekto havas kvin partojn de pentrarto, skulpturo, metiarto, arkitekturo kaj kaligrafio kaj sigelila gravurarto, kiuj estos kronologie kompilitaj. Laŭ unuapaŝa plano la kolekto konsistas el 100 volumoj, kiuj sinsekve eldoniĝos en dek jaroj.



Chen Jingde, kamparano de Zhushan-gubernio, Hubei-provinco, en sia 106-jara aĝo

第 三 课 Tria Leciono

1. Vortoj

han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
的	de	partikulo ^①
名字	míngzi	nomo
是	shì	esti
什么 ^②	shénme	kio
我	wǒ	mi
安娜	Ānnà	Anna (<i>persona nomo</i>)
叫	jiào	nomiĝ- ^③
林红	Lín Hóng	Lin Hong (<i>persona nomo</i>)

2. Teksto

han-lingvo

han-lingva fonetika alfabeto

laŭvorta traduko

Esperanta traduko

han-lingvo

han-lingva fonetika alfabeto

laŭvorta traduko

Esperanta traduko

han-lingvo

han-lingva fonetika alfabeto

laŭvorta traduko

Esperanta traduko

han-lingvo

han-lingva fonetika alfabeto

laŭvorta traduko

Esperanta traduko

A: “你的名字是什么?”^④

A: “Nĭde míngzi shì shénme?”

A: via nomo esti kio

A: “Kio estas via nomo?”

B: “我的名字是安娜。”^⑤

B: “Wǒde míngzi shì Ānnà.”

B: mia nomo esti Anna

B: “Mia nomo estas Anna.”

A: “欢迎你，安娜！我叫林红。”

A: “Huānyíng nǐ, Ānnà! Wǒ jiào Lín Hóng.”

A: bonven- vi Anna mi nomiĝ-
Lin Hong

A: “Bonvenon al vi, Anna! Mi nomiĝas Lin Hong.”

B: “你好，林红！”

B: “Nĭ hǎo, Lín Hóng!”

B: vi bon- Lin Hong

B: “Saluton, Lin Hong!”

Klarigoj

① “的” estas partikulo kun multaj funkcioj. Oni metas ĝin post person-pro-nomo por montri la posedanton de la koncernata afero. Tio estas unu el ĝiaj funkcioj.

Ekzemple “的” post “你” (vi) formas la posesivon “via” en Esperanto. Same estas “我的”, kies senco estas “mia”.

② demanda pronomo

③ “叫”: vorto plursenca kaj ofte uzata. “nomiĝ-” estas nur [unu] el ĝiaj sencoj.

④ Por demandi la nomon, krom tiu ĉi frazmodelo, estas ankaŭ aliaj dirmanieroj, kiujn ni prezentos poste.

⑤ La frazojn en han-lingvo oni povas dividi laŭ ilia enhavo en la jenaj 4 specoj: Indika frazo. En ĝi oni ion simple rakontas, diras aŭ asertas. En ĝia fino oni metas “。” per kiu la han-lingvo diferencas de Esperanto kaj multaj aliaj alfabetaj skriblingvoj, kiuj finis sian indikan frazon per “.”. Ekzemple: “我的名字是安娜。”


Demanda frazo. Per ĝi oni faras demandon aŭ retorikan demandon. Ekzemple “你的名字是什么?”

Ordona frazo. Ĝi montras ordonon, peton, deziron, k.t.p. Vidu “请坐”, “请喝茶” en la dua leciono. Fininte tian frazon oni povas uzi la signon “。” aŭ tiun de “!” , se la volo estas pli forta.

Ekkria frazo, per kiu oni esprimas sian fortan senton de plezuro, ekscitiĝo, danko, malĝojo, surprizo, kolero k.a. Ĉe ĝia fino oni uzas ekkrian signon “!” , ekzemple “谢谢!” en la leciono unua kaj “谢谢你!” en la dua.

3. Tabelo de ĉinaj ideografiaĵoj

的	丶 亻 白 白 白 白 的 的
名	丶 夕 夕 夕 夕 夕 夕
字	丶 丶 丶 宀 宀 宀 宀 字 字 字
是	丨 丨 丨 丨 日 日 日 日 是 是 是 是
什	丶 亻 亻 什 什
么	丶 么 么
我	丶 一 手 手 我 我 我
安	丶 丶 宀 宀 宀 宀 安 安
娜	亻 亻 女 女 女 女 女 女 娜 娜 娜 娜
叫	丶 丨 丨 丨 叫 叫
林	一 十 才 木 木 木 林 林 林
红	亻 纟 纟 纟 纟 纟 红 红 红



Proksime de Pekino

de LI PING

ĈE Badaling nordokcidente de Pekino bone konserviĝis parto de la Granda Muro. La murego sur altaj kaj krutegaj montoj ĉiutage altiras al si sennombrajn vizitantojn. Ĝi estas unu el la plej famaj turismaj objektoj en la mondo.

JUYONGGUAN-PASEJO

Estis aŭtuno, la ora sezono de Pekino. Fru-matene ni ekveturis de la urbo al Badaling per aŭto. Ambaŭflanke de la vojo staras arboj. Ni sentis agrablan, malvarmetan venteton.

Alproksimiĝante al la celloko ni vidis Juyongguan-pasejon, konstruitan en valo, ĉirkaŭ 60 kilometrojn nordokcidente de la urbo. Ĉe ambaŭ flankoj de la valo ondiĝas verde vestitaj montoj. Jam antaŭ 800 jaroj la loko estis unu el la ok vidindejoj de Pekino.

Kiel grava pasejo de la Granda Muro, Juyongguan estis pordo de la antikva Pekino. Post sia fondiĝo en 1368 Ming-dinastio donis grandan atenton al Juyongguan. En 1368 ĝi sendis generalon Xu Da al tiu loko por gvidi mur-konstruadon. Kaj post la konstruado ĝi garnizonigis tie 5 000-6 000 soldatojn. En 1644 kamparanaj ribeluloj sub la gvido de Li Zicheng sturmis Pekinon ĝuste tra tiu pasejo kaj finis ĝian regadon de preskaŭ 300 jaroj.

Hodiaŭ la loko fariĝis tre kvieta, nur flavaj arbofolioj susuris en vento. Imagante al mi la antikvan tempon, kiam tie muĝadis kanonoj kaj flirtis armeaj flagoj, mi pleniĝis je neesprimeblaj sentoj.

En la mezo de Juyongguan staras blankmarmora teraso kun tre belaj gravuraĵoj. La tri ŝtonaj pagodoj sur la teraso ruiniĝis jam antaŭlonge. Ĉe ĝia malsupra parto estas arkpordo sep metrojn


alta kaj ses metrojn larĝa, trairebla por veturiloj kaj ĉevaloj. Interne sur la pordarko videblas reliefoj de Orflugila Birdo kaj Serpento-spirito. La Orflugila Birdo, monstro en hinda mito, sin nutras per serpento. La mito koniĝis en Ĉinio eble kune kun budhismo. Sur la internaj muroj de la arkpordo estas gravuritaj ĉielaj dioj kaj sutroj en la sanskrita, tibeta, ujugura, hana kaj aliaj du lingvoj, kiuj havas altan artan valoron. Tiuj skribaĵoj gravuritaj spegulas kulturalan interŝanĝon inter naciecoj.

QINGLONGQIAO-STACIO

Tiu fervoja stacio, ĉ. dek kilometrojn okcidente de Juyongguan, estas ordinara kaj malgranda, tamen sufiĉe fama. Ĝin trairas la fervojo inter Pekino kaj Zhangjiakou.

Apud la stacio estas bronza statuo de viro, malantaŭ kiu staras marmora steleo sur teramaso, sub kiu kuŝas la fama ĉina inĝeniero Zhan Tianyou (1860-1919).

La supre menciita fervojo kun totala longeco de pli ol 200 kilometroj estis projektita de li. Li esploris montaron, kiun okcidentaj inĝenieroj opiniis nevenkebla por ĉinoj en fervojkonstruado. La tieaj montoj estas tiel krutaj, ke trajno ne povas supreniri serpentume ĉirkaŭ ili. Li do projektis parton de la fervojo en V-formo, por ke oni veturigu trajnon unue supren al la stacio Qinglongqiao kaj poste turnu ĝin al alia direkto kaj daŭre suprenigu ĝin. Tiel solviĝis la problemo. Inter Juyongguan kaj Badaling oni faris kvar tunelojn, el kiuj la tunelo Badaling kun longeco de 1 091 metroj estis konstruigita de li per metodo unue fari vertikalan ŝakton en la mezo kaj poste tuneli al ambaŭ direktoj. Post lia morto oni starigis la statuon kaj steleon por memorigi pri li.



*La bronza statuo
de Zhan Tianyou*

La bronza statuo de Zhan kun medita mieno kaj mallevitaj okuloj direktitaj al la interkruciĝantaj trakoj faras la impreson, ke li streĉas la menson por solvi teknikajn problemojn.

BADALING

Badaling nemalproksime de Qinglongqiao estas pli kruta ol Juyongguan-pasejo. Ĝuste kiel antikvuloj diris, pli grandan krutecon havas ne Juyongguan, sed Badaling. La paseja ĉirkaŭmuro konstruiĝis en 1505. Ĝi havas po unu pordon en oriento kaj okcidento. Super la okcidenta pendas horizontala tabulo kun gravuritaj vortoj "Norda Seruro". Se Juyongguan-pasejo estas pordo de la antikva Pekino, do Badaling povas esti rigardata kiel solida seruro.

Tiu parto de la Granda Muro ĉe Badaling reprezentas ĝian tuton starigitan en Ming-dinastio. La konstruado de la dinastio estis jam alta. Ĉar oni bezonis multegon da konstrumaterialoj, oni hakis ŝtonojn kaj bakis brikojn ĉe la loko. La orienta parto de la muro estis farita ekstere el grandaj brikoj kaj ĉirkaŭhakitaj ŝtonoj kaj interne el ŝtonpecoj kaj ramita tero. La plej alta kaj fortika estas tiu parto ĉe Badaling. Inter la ruinaj ŝtongravuraĵoj de la Granda Muro oni trovis steleon de 1582 p.K., sur kiu antikvuloj registris

la fakton, ke miloj da soldatoj kaj multegaj kamparanoj konsumis ĉ. duonjaron por konstrui murparton nur iom pli ol 200 metrojn longan. Kiel malfacila konstruo!

La Granda Muro ĉe Badaling estas meznombro 7.8 metrojn alta, 6.5 metrojn larĝa ĉe la bazo kaj 5.8 metrojn larĝa ĉe la supro. En unu flanko de la muro troviĝas arkpordoj nelonge distancaj unu de alia. Ĉiu pordo havas ŝtonan ŝtuparon, laŭ kiu antikvaj soldatoj povis iri de la murpiedo supren al gardoturo.

Sur iu gardoturo mi direktis la rigardon malproksimen kaj vidis kontinuajn montojn kaj militalarmajn signalterasojn. La Granda Muro, aspektanta kiel giganta drako, jen saltis sur montsupron, jen sin kaŝis en valo. Sub la muro fajre ruĝis acerfolioj.

Sur la Granda Muro promenis ĉinaj kaj alilandaj turistoj, kies brilkoloraj vestoj buntigis la muregon. Ili parolis pri la muro en malsamaj lingvoj. Inter la senlacaj vizitantoj troviĝis ŝancelpaŝaj infanoj kaj blankharaj maljunuloj. Multaj fotiloj estis en vigla laboro kaj ĉarmaj pejzaĝoj estis kaptitaj kiel memoraĵoj.

Mi renkontis grupon da maljunaj turistoj alilandaj. Mi eksciis de interpretisto, ke ĝi venis el Usono. Iu 69-jarulo kun kamerao enmane diris al mi, ke li legis nemalmultajn artikolojn kaj rigardis nemalmultajn bildojn pri la Granda Mu-

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



ro, sed hodiaŭ li, starante sur la muro, trovis ĝin tute fremda al lia imago. Alia maljuna membro diris, ke la Granda Muro vere estas unu el la mirakloj de la mondo.

Mi ekmemoris, ke antaŭ kelkaj jaroj la brita eksĉefministro H. Macmillan supreniris la Grandan Muron en sia aĝo de 85 jaroj kaj admiris: “Miraklo, vere miraklo de la mondo!” “Belega! Kiu ne volus refoje rigardi tian miraklon?”

Laboranto de la administracio de Badaling konigis al mi, ke de la lastaj jaroj oni rapide disvolvas la turisman aferon de Badaling kaj ĉiujare akceptas pli ol milionon da vizitantoj. Oni funkciigas specialajn turismajn trajnojn kaj aŭtobusojn inter Pekino kaj Badaling, por ke turistoj povu reveturi hejmen tuj post sia unutaga vizito. En la loko servas diversaj butikoj, vendobudoj kaj manĝejoj.

“LA DUA BADALING”

La parto de la Granda Muro ĉe Jinshanling inter Pekino kaj Chengde estas komparebla kun tiu ĉe Badaling, tial oni nomas Jinshanling “la Dua Badaling”.

Post du-hora aŭtoveturado nordorienten de Pekino laŭ la Pekin-Chengde-a Ŝoseo, mi atingis Bakeshiying, Luanping-gubernio, Hebei-provinco. Kaj post kelka piedirado mi venis al Jinshanling. Mi supreniris gardoturon kaj al miaj okuloj tuj prezentiĝis grandioza pejzaĝo de montoj kun la Granda Muro serpentanta en nebulo.

La murego ĉe Jinshanling estas parto de la Granda Muro de Ming-dinastio. Ĝi, kun longeco de 47.5 kilometroj, havas 158 gardoturojn. Ĝi karakteriziĝas per denseco de tiaj turoj, komplekseco de ilia strukturo kaj diverseco de iliaj formoj.

Oriente de Jinshanling verdetas la akvorezervejo Simatai, norde de kiu estas termofonto ĉe la Granda Muro. Oni diras, ke en la antikveco murkonstruantaj soldatoj masonis tie brikan basenon por sin bani en ĝi post laborado.

La plej alta konstruaĵo sur la muro estas Wangjing-turo. Tie la roka monto estas krutega kaj la kamparanoj donis al ĝi la nomon “Azena Dorso”. Mi supreniris al la turo kaj antaŭ mi etendiĝis vasta horizonto. Se estus bona vetero, oni povus vidi tie la konturon de Pekino. Estas neimageble, kiel oni povis starigi la konstruaĵon sur tiel kruta monto.


Legendo diras, ke antaŭ tre longa tempo iu knabo-paŝtisto memvole gardis tie la Grandan Muron. Iun tagon li venis denove al sia gardoturo kaj rimarkis paron da ruĝaj broditaj ŝuoj. Apenaŭ li ĵetis al ili atentan rigardon, ili transformiĝis en belan knabinon. Laŭ ordono de la Ĉiela Imperiestro ŝi venis al la homa mondo por gardi la Grandan Muron. Vidinte, ke la knabo prizorgas la muron kiel sian hejmon, ŝi enamiĝis al li. Ili petis la dion de monto esti ilia edziĝatestanto. Post riverencado al la ĉielo kaj la tero ili fondis familion ĉe la Granda Muro kaj kune ĝin gardadis.



BADALING

Fotoj de LI BO



Turistoj sur la Granda Muro





La Granda Muro en aŭtuno

Pordego de Juyong-pasejo






Antikva fuorto



Interese estas fo-
tiĝi sur kamelo!

La Granda Muro ĉe Badaling



Vestoj kaj Ornamaĵoj de Mjaŭ-aj Virinoj

(Bv. legi la artikolon "Kolorriĉaj kostumoj kaj ornamaĵoj de mjaŭ-aj virinoj" en tiu ĉi numero.)

Fotoj de CHEN XIWEI

Diademo de junulino



Mjaŭ-aj virinoj de Huangping




Mjaŭ-aj knabinoj de Anlong en Guizhou



Mjaŭ-aj junulinoj

Kolorriĉa antaŭtuko de mjaŭ-a virino






**bambuaj plektaĵoj de
Shengxian-gubernio
en Zhejiang-provinco**

8152 ✓

Aglo



leopardo